

MALGRANDA REVUO

Nro 2 • 1950
8a JARO

PREZO: 1:– Kr.

ENHAVO:

	Paĝo
Du poemoj, de L. C. Deij.....	1
Albert Schweitzer, de D. A. Werner.....	2
Kelkaj facetoj de logiko, de K. Wilgenhof.....	5
Grava rimarkigo.....	12
Nova germana letero.....	14
Israela letero.....	22
Glasgovo, de William Auld.....	27
Pensoj enkorpiĝas, de L. C. Deij.....	29
Pri kreado, de Karel Čapek.....	30
La pluvera preludo, de Henk Valckenier.....	35
pri majuskloj, de William Auld.....	36
Komentoj.....	38
Literaturo.....	40

Redaktoro — Eldonanto:
STELLAN ENGHOLM, HAGGE, SVEDUJO

MALGRANDA REVUO

aperas dumonate, Prezo 1 kr. (inkl. sendkoston). Jarahono 6 kr. Unuopa ekz. al eksterlando kontraŭ 3 rpk. — S. Engholm, Box 205, Hagge, Svedujo. Poŝta ĝirokonto 26 80 23. MR ne aperigas anoncojn aŭ informojn.

Nemenditaj manuskriptoj estas resendataj nur se akompanas ilin afranko por resendo.

Perantoj

- Aŭstrio: Eldonejo "Tramondo", Neutorgasse 9, Wien I.
Belgujo: Flandra Esperanto-Instituto, P. van Humbeekstr. 3, Brusel W.
Brazilo: Sro Jozefo Joels, Caixa Postal 2 — Lapa, Rio de Janeiro.
Britujo: Libroservo de UEA, Heronsgate, Rickmansworth (Herts).
Ĉeĥoslovakio: Esperanto-Asocio en CSR, Uralské nám. 9, Praha.
Danujo: Libroservo de CDEL, Pr. Jørgensgade 4 A, Kopenhago N.
Finnlando: Eldono Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinko Kä.
Francujo: Unuiĝo Esperantista de Francujo, 34 rue de Chabrol, Paris X.
Germanujo: Dr. Siegfried Ziegler Verlag, Engelbertstrasse 7, (13 b) München-Pasing.
Italujo: Sro Leo Costantini, Piazza Lagosta 2, Milano.
Nederlando: Sro L. C. Deij, Putsebocht 181, Rotterdam Z.
Palestino: Sro J. Kohen-Cedek, P. O. B. 7015, Jerusalemo.
Polujo: R. Sakowicz, Parafialna 3, Nova Sól.
Svisujo: Sro O. Walder, Elgenheim, Romanshorn.
Usono: Libroservo de American Esperantist, 114 W. 16 St, New York 11.

MALGRANDA REVUO

Nro 2

8a JARO

1950

Du poemoj

de L. C. Deij

LA GAJNO

Tiel ŝtele, ŝtele la vespero venis,
ke mi ne komprenis,
kiam tago ĉesis, kiel ĝi foriris.
Io tuŝis min aŭ la interno diris
— tion mi forgesis — :
"Preĝu homo!" kaj hezite mi kapjesis.

Kaj aperis fore steloj el nenio;
nuboj, vento, ĉio
fluis pli senmove; tiam mi singultis
mian preĝon, kaj la nokto min aŭskultis
kaj al mi respondis
la sopirojn, kiujn hom' neniam sondis.

Kiam la internvibrigo de l' senlimo
pulsas en animo,
tiam homo sentas la misterojn veraj,
kiujn ne instruas filozofoj teraj;
tiam hom' konscias:

"Pri la vivenigmo mi nenion scias!"
Tiam al si mem li mem polvo ŝajnas,
sed malgranda gajnas
kion nur respektosentaj homoj konas:
tiam perspektivimagon, kiu donas
celon por ekzisti
kaj esperon novan, daŭran por — persisti.

Paco! kiel vivaltige vin koncepti!
Kiel peze min dediĉi kun fervoro,
kiam propraj emoj la koncepton spitos!
kaj elteni, ĝis mi povos vin akcepti
en mi mem, en mia propra koro —
pentofari, ĝis mi vin meritos!

Albert Schweitzer

De D. A. Werner

Kiuj el ni ne konas la nomon Albert Schweitzer? Certe nur malmultaj. Aŭdante tiun nomon tamen ne ĉiu pensas la samon. Unu diras: Ho, tiu estas la fama misia kuracisto en Centra Afriko. Alia aldonas: Li estas la granda eksperto kaj interpretisto de Bach. Tria diras: Schweitzer estas la granda pensulo de hodiaŭ, la viro kun la ctiko pri respekto al la vivo. Kaj kvara ekkrias: Li estas la granda imitanto de Kristo, la homo de la ago, elirinta pro la motivo servi la kunhomojn.

Jen multaj flankoj de tiu viro, kiu pasigis sian 75an naskiĝotagon en la praarbaro ĉe siaj malsanuloj. Kaj pro tiu festotago ni mencias kelkajn apogojn de lia riĉa vivo.

Deveninte el la predikista familio Schweitzer li jam frue ekhavas ĝustan senton por spiritaj homaj valoroj. Poste li collaboros tion en sia kulturfilozofio. Kiam li estas 18jara, li komencas studi en la universitato de Strasbourg en du fakultatoj, la teologia kaj la filozofia.

La vivo de Jesuo allogas lin en lia kvalito de teologo kaj kondukas lin al serioza studo, kaj li dediĉas sin precipe al la historiaj faktoj. Tiu studo kreskas ĝis ĉefverko, kaj en 1906, jam profesoro de du fakultatoj en la aĝo de 31 jaroj, li publikigas sian "Historio de la esploro pri la vivo de Jesuo", ankoraŭ hodiaŭ konsiderata kiel unu el la grandaj teologiaj verkoj.

Kiel pensulo Schweitzer sentas sin tirata al Immanuel Kant,

la germana filosofo. Li havas multon komunan kun tiu scienculo, kaj en la etiko de ambaŭ sendube ekzistas parencaj trajtoj.

Bach-interpretisto.

Krom tio Schweitzer kiam infano havas eksterordinaran muzikan talenton. Kiam li estas naŭjara, la orgenisto de lia naskiĝvilaĝo Gunsbach kelkfoje permesas al li anstataŭi lin dum diservo. Lia patro, jam frue vidante tiun muzikan flankon de sia filo, sendas lin al Parizo por ricevi lecionojn de la franca komponisto Charles Marie Widor. La amo de Schweitzer celas la orgenon, la reĝon de la instrumentoj. Lia preferata komponisto estas Johann Sebastian Bach, la eminentulo el la famaj. Ludante li profundigas en la figuro de Bach kaj scias respondi la demandon de Widor, en kio konsistas la mistero de la ĥoralpreludoj de Bach. Schweitzer atentigas Widor, ke oni povas kompreni tiujn komponaĵojn nur tiam, kiam oni legas la tekston de la ĥoraloj. Jen nova vidpunkto, nekonata al Widor. Tiu petas Schweitzer publikigi ion pri Bach. Kiam 30jara li tute absorbiĝas en la persono kaj la verkoj de la mondfama komponisto. En 1905 li eldonas sian francan Bach-biografion. Baldaŭ venas peto, ke li traduku tiun libron en la germanan. Schweitzer komencas tiun laboron, sed dume konkludas, ke li ne povas traduki sian propran verkon, kaj tial li tute reverkas ĝin en la germana lingvo, kaj ĝi fariĝas duoble pli dika libro. Per tio Schweitzer liveras sian duan ĉefverkon.

Schweitzer estas ne nur la Bach-biografo, samtempe li estas la orgenisto. Jam kiam juna li donis orgenkoncertojn, kaj ĉie, kie li ludis, la preĝejoj estis plenaj. Li donis apartan interpreton, kaj tre ĝuis tiuj, kiuj venis por aŭskulti la verkojn de Bach ludataj en profunda simpleco sed tute en akordiĝo kun la animo de Bach mem. Schweitzer scias doni en sia ludo tiun emocion, kiun ankaŭ Bach laŭ nia opinio sentis dum la kreado de sia muziko.

Pro orgenkonstruado kaj reproduktado de orgenverkoj ĝenerale Schweitzer publikigis multon; li batalis por konservado de la orgenoj el la 18a jarcento.

Kiel kuracisto al la praarbaro.

Sed la plej nobla ĉe Schweitzer nekontesteblas estas lia iro al Afriko. En tio li praktikas siajn etikajn kaj religiajn spekulativojn. Ĉar antaŭ ĉio ni ne forgesu, ke Schweitzer estas homo de agado. Kiam 20jara studento li decidis ŝanĝi la direkton de sia vivo en la 30a jaro. Li sentas sin tiom privilegiita en scienco kaj muziko, ke li poste volas dediĉi sian vivon al aliaj kaj helpi por servi kunhomojn. Pere de broŝuro li ekscias pri la mizero en Centra Afriko; misiistoj troviĝas tie, sed kuracistoj mankas. Post tiu momento Schweitzer sciis, kion li entreprenos. Li cedis sian fiksitajn gloran sciencan kaj muzikan karieron kaj komencis studi medicinon. Li foriros al izoleco en Afriko, sed li ne sciis tiam, ke ĝuste pro tio li ĝuos la plej altajn admiron kaj estimon, kiuj manifestiĝos per granda financa apogo. Post edziĝo kaj promocio en medicino li en 1913 kun sia edzino iris al Afriko. Ĉie oni sekvas liajn klopodojn. Li venis en regionon kun mortiga klimato, plena de malsanoj. Schweitzer devis batali kontraŭ multaj sortobatoj. Komence la negroj estis malamikaj kaj opiniis, ke li venas por mortigi ilin. Ĉiu sukcesa operacio en la unua tempo estis por li duobla venko.

Ekzistis pluraj motivoj, pro kiuj Schweitzer iris al Lambarene en Afriko. Li deziris anstataŭe pentofari pro la teruraĵoj, kiujn la blankuloj pli frue faris al la negroj. Ni pensas pri la sklavkomerco, infektaj malsanoj kaj la alkoholo, kontaktilo inter negroj kaj blankuloj. Tiel lia entrepreno estis regata de la ideo pri kulpo antaŭ la negroj. Tiel lia helpo al ili havis profundan sencon. Samtempe tio estas sublima formo por apliki la evangelian tekston: Kion vi faris por la plej humilaj el miaj fratoj, tion vi faris por mi.

La granda kuracisto.

Jam 45 jarojn Schweitzer laboras en Lambarene, kaj la iam mizera malsanulejo kreskis ĝis impona hospitalkomplekso. Tie la granda kuracisto ĝuas famon malproksime ĉirkaŭe. Sennombraj negroj estas korligitaj al li kiel infanoj; li estas ligita al ili kiel patro, kaj lia koro estas en Lambarene.

En 1949 li denove venis al Europo, multfoje prokrastinte sian

vojaĝon. La verkanto de ĉi tio havis la plezuron kaj la privilegion renkonti Schweitzer en Rotterdam dum lia transvojaĝo de Svedujo kaj Danujo al Gunsbach. Tie sidis la simpla eminentulo antaŭ mi. La nekombita hararo de la impona kapo kaj la hirtaj lipharoj fariĝis pli grizaj, de kiam mi renkontis lin lastfoje, sed li havis neniun de maljunulo. Vigle kiel ĉiam Schweitzer rakontis pri ĉio: Lambarene, Ameriko. Kio plej mirigis min estis eble tio, ke malgraŭ sia restado en la praarbaro li estis precize informita pri la internacia situacio, la valuto kaj la filmtekniko. Evidente li estis sperte lerta en ĉiu kampo. Montriĝis ankaŭ, ke li perdis neniun de sia bonhumoro, malgraŭ siaj 74 jaroj. "Se mi ne havus bonhumoron", li diris, mi ne povus elteni la afrikan vivon. La bonhumoro gardis min kontraŭ malvigliĝo pro la klimato aŭ la konduto de la primitivuloj."

Nun li jam havas 75 jarojn. La lastan naskiĝotagon li festis ĉe siaj negroj. Estis nek festeno, nek jubileo sed ekstreme modera festotago meze de liaj kunlaborantoj kaj malsanuloj. Tiu tago certe ne estis alispeca ol ordinare. Eble li ellitiĝis iom pli frue por senŝarĝigi aliajn de iliaj tagaj okupoj. Li, la granda simpla viro, la efektiva kristano, esprimos per tropika piano sian dankon, kiam li nokte estos sola kun Bach, kaj sonigos fugon antaŭ Dio, kiu ebligas al li daŭrigi sian laboron inter la plej kompatindaj el la mizeruloj.

El la nederlanda tradukis J. M. Toorneman.

Kelkaj facetoj de logiko de K. Wilgenhof

"La vero estas vualita."

H. Rider Haggard.

Se iu diras: "La suno estas for", neniu kredas, ke la suno forlasis sian lokon en la universo kaj malaperis. Li intencis esprimi nur tion, ke la suno estas nevidebla. Tial logikema homo opinias la diron neĝusta. La dirinto korektas: "La suno

kaŝiĝis malantaŭ nubo", aŭ "Ĝi malleviĝis sub la horizonton". Sed la severa kritikanto estas ankoraŭ ne kontenta. Kio estas "malantaŭ" kaj "sub", li demandas. Tio estas subjektivaj ideoj, eĉ ne validaj por ĉiuj homoj. Se laŭ via vidpunkto la suno malleviĝis sub la horizonton, ĝi levis sin en tagiĝo por aliaj sur la tergloblo. La nubo, kiu kaŝas la sunon de vi, estas nur malgranda. Kelkajn mejlojn de nia loko aliaj homoj ankoraŭ ĝuas la sunbrilon.

Tiu ekzemplo estas sufiĉa por montri, ke kelkaj asertoj havas nur limigitan validon, ili estas "lokaj veroj". Kaj ni jam konscias, ke en la ĉiutaga praktika vivo oni ne povas esti nepre logika en ĉiuj cirkonstancoj kaj en plena mezuro.

Jongli per verosilogismoj.

De 384 ĝis 322 a. Kr. vivis la antikva greka filozofo Aristoteles, "la patro de la logiko". Li disvolvis la unuan vastan sistemon de pruvoj. Ĉiuj pruvoj, rezonoj okazas laŭ procedo, kiun li nomas *silogismo*. Ĝi konsistas el du juĝoj (asertoj), la premisoj, kaj konkludo.

Ekzemple: Krime estas malbona, ŝtelo estas krime. Do ŝtelo estas malbona.

Ĉi tiu silogismo estas tre simpla, sed aliaj povas esti pli komplikaj. Ĉiuj tamen devas esti laŭ certaj reguloj, por ke ili validu. Silogismo devas ekzemple enhavi ne pli ol tri ideojn (supre: krime, ŝtelo, malbona), kaj la premisoj ne estu negativaj juĝoj. Tial la sekvanta rezono ne estas silogismo:

ŝafo ne estas serpento. Serpentoj ne estas kvarpeduloj. Do ŝafo ne estas kvarpedulo.

Se la silogismo estas formita laŭ la reguloj, ĝia konkludo estas necvitebla kaj nepre logika.

Pro tio la silogismo plenumis ĉefan rolon en la antikvaj kaj mezepokaj filozofio kaj sciencoj. Oni rigardis ĝin kiel la absolutan, rokfirman rimedon por trovi la veron. Dum longa tempo ĝia signifo estis superrega en la scienco pri la sciado.

En la mezepoko oni uzis ĝin ankaŭ por pruvi la ekziston de Dio, kvazaŭ dia estaĵo ne estus super kaj ekster ĉia homa rezonado. Precipe la ekleziulo Anselmus de Canterbury (1033—

1109) fariĝis konata pro tiaj dipruvoj. Unu el tiuj silogismoj estas:

Dio estas perfekta estulo. Perfekta estulo ekzistas. Do Dio ekzistas.

Estas klare, ke li ne distingis pensobjekton de reala afero. Ĉiu povas imagi perfektan estulon, sed tio ne signifas, ke la pensata reale ekzistas. La pensomondo kaj la reala mondo ne estas identaj.

Multaj homoj rezonas jene:

Artefaritaj lingvoj estas senvivaj. Esperanto estas artefarita lingvo. Do esperanto estas senviva.

Precipe tiu silogismo supozeble sufiĉas por klarigi al vi, ke silogismo povas esti formale ĝusta sed tamen ne kondukas al vero. Ĝi povas liveri al ni nur logikajn konskveneojn, sed cetere ĝia konkludo estas vera, nur se ambaŭ premisoj estas veraj. En la ĵusa silogismo la unua validas ne ĝenerale. Tio estas tuj evidenta por ĉiu, kiu iom scias pri la koncerna temo. Sed ne en ĉiuj kazoj la craro estas tiel facile montrebla. Kion vi opinias pri tio ĉi:

Elektro estas elektronoj. Elektronoj estas nevideblaj. Do elektro estas nevidebla.

Tiu silogismo ŝajnas tute ĝusta, kaj probable multaj ne emas kontraŭi ĝin, antaŭ ol ili legis tion ĉi:

Materio estas atomoj. Atomoj estas nevideblaj. Do materio estas nevidebla.

Tiu konkludo sendube renkontos protestojn. Ĝi nekontesteble faras eĉ la antaŭan silogismon malfidinda. Fariĝas nun evidente, ke tiu kaŝas ian internan mankon. Mi lasas al la legantoj trovi ĝin.

Kiam oni ankoraŭ restas en la kampo de pura abstrakta scienco, tiaj erarigaj rezonoj ne estas tre danĝeraj al la vivo. Tuj aŭ baldaŭ ili puŝas nin kontraŭ neveraĵojn, kaj ni korektas la rezonon.

Alie estas eĉ malfacile difineblaj aferoj, al kiuj la homoj ĉiutage rilatas kaj kiuj tuŝas iliajn plej profundajn kredojn. Ofte oni nekonscie rezonas laŭ jena silogismo:

Anoj de la x-ismo estas bonaj homoj. Ni estas x-istoj. Do ni estas bonaj homoj.

Plurfoje eĉ pli ekskluzive: *nur* x-istoj estas bonaj homoj; do konklude: *nur* ni estas bonaj homoj; aŭ alivorte: ĉiuj ne-x-istoj estas malbonaj; kaj eĉ: ili estas senrajtigindaj, ekstermindaj.

Ni jam komprenas, ke tiaj personoj ne konkludas el logikaj argumentoj sed simple elpensas logikajn rezonojn por povi sur ili starigi siajn jam antaŭe pretajn "konkludojn" kaj tiel povi sin ornamati aŭ, pli ĝuste, maski per vesto de objektiveco.

Nei estas malfacile; paradoksoj.

Unu el la fundamentaj principoj de la logiko diras, ke aserto kaj ĝia neopovas esti ambaŭ veraj. Se Georgo diras: "Tiu botelo enhavas akvon", kaj Henriko diras: "Tiu botelo ne enhavas akvon", nur unu el ili diras la veron.

La nomita principo — ĝia latina nomo estas principium contradictionis — estas tiom evidenta, ke ŝajnas superflue diskuti pri ĝi. Ĉi estas tiom simpla kaj certa, ke oni emas konsideri ĝian validon pli granda, ol ĝi efektive estas.

Estas ja klare, ke la principo ne ĉiam validas por asertoj, kies subjekto estas plurala, ekzemple: "Ĉiuj ŝafoj estas blankaj — ĉiuj ŝafoj estas neblankaj". Ambaŭ asertoj estas neveraj.

Sciante, ke kameleono povas ŝanĝi sian koloron, oni prave opinias, ke ne havas sencon la sekvantaj asertoj: "Ĝi estas blua besto; ĝi estas neblua besto". Kaj kion diri, se propagandisto emfazas: "Esperanto estas facila", kaj lernanto plendas: "Esperanto estas nefacila". La vereco en tio dependas de vidpunkto kaj lernpovo.

Ni do jam vidas, ke en la praktika vivo la demando pri "tia aŭ ne tia" ne ĉiam estas respondebla per simpla jes aŭ ne.

Absoluta aparteco de vera kaj nevera estas iluzio. Al la vorteto *ne* ni ne povas plu atribui karakteron de absoluta nepro. Kaj ni komencas kredi, ke ĝia signifo estas iom nebula kaj varia, ke ĝia funkcio estas malforta kaj akcesora.

Tamen ni miskalkulis. Per surpriza turno la vorteto *ne* reprenis la perditan terenon kaj ekokupas fortikan postenon, de kiu ĝi pafas al ni per grenadoj, kiujn ni nomas paradoksoj aŭ anti-

nomioj. Jen venas tia grenado, klasika paradokso: Kretano diris: "Ĉiu kretano mensogas". Se la kretano pravus, ankaŭ li mensogas. Ĝar li mensogas, li do tamen ne pravus. Se inverse la kretano ne pravus, lia aserto estas nevera, kaj el tio sekvas, ke li diris ion veran.

Ĉiu el ambaŭ supozoj pri la vereco de lia aserto kondukas al konkludo, kiu estas kontraŭa al la supozo, sur kiu ĝi baziĝas.

Jen alia, la t. n. paradokso de Russel. Ĉe tiu ni bezonas mallongan antaŭklarigon. En la logiko oni konas la econ *aŭtologa*. Eco estas aŭtologa, se ĝi mem havas la econ, kiun ĝi esprimas. Do la eco E, kiu mem estas E, estas aŭtologa. Ekzemploj: abstrakta, adjektiva, naŭlitera.

Nun ni rigardu la econ *neaŭtologa*, kiu do estas negativa eco, neop. Johano diras, ke la eco neaŭtologa estas mem aŭtologa. Se li pravus, se ĝi vere estas tia, ĝi do estas neaŭtologa laŭ la difino de aŭtologa. Petro asertas la malon: neaŭtologa estas mem neaŭtologa. Laŭ tiu vidpunkto ĝi do estas aŭtologa.

Konkize dirate, se ni demandas pri la aŭtologeco aŭ neaŭtologeco de aŭtologa, ni ricevas la respondon: aŭtologa = neaŭtologa, kaj inverse. Denove *ne* starigis antaŭ ni embarasan problemon.

Kvankam la paradoksoj ne estas gravaj por la praktika vivo, ili estas tre ĝenaj al la teoria logiko. Logiko, kiu enhavas antinomiojn, ne estas fidinda. Oni povas eĉ demandi, ĉu logiko entute povas ekzisti.

Ĉu tiaj paradoksoj estas neniel solveblaj? Precipe la angla filozofo Russel klopodis pri ili. La esenco de lia teorio estas, ke li dividis la ecojn en rangajn kategoriojn. Al la unua kategorio apartenas ĉiuj simplaj ecoj, al la dua ecoj de ecoj. Ĉiu aserto, kiu validas en unu kategorio, ne rekte taŭgas por ĉiu alia. Tiel paradoksoj estas eviteblaj, sed ĉu la kategoriteorio cvitigas *ĉiujn* antinomiojn, tio ne estas tute certa. Certa estas nur tio, ke la teorio "savis" la logikon nur per plikomplikigo.

Aldone mi rakontos al vi jenan paradokson:

Infano ludas ĉe la bordo de Nilo. Subite granda, maljuna krokodilo proksimiĝas kaj kaptas ĝin, antaŭ ol la patrino povas savi ĝin.

Kun la infano inter la makzeloj la besto naĝas al proksima

insuleto. La patrino ekgenuas kaj petegas: "Ho, kara krokodilo, reportu al mi la infanon."

"Mi tion faros", konsentas la krokodilo, "kondiĉe ke vi ĝuste divenos, kion mi faros al la bubo — manĝos aŭ redonos."

La patrino pensas: "Se mi diros redonos, la monstro respondos, ke estas erare, kaj englutos lin. Tial ŝi respondas, ke manĝos, kaj ĝoje aldonas: "Nun vi devas laŭ via promeso redoni la infanon. Se mi ĝuste divenis, mi reakiros ĝin. Se mi divenis neĝuste, vi sendube ne povos formanĝi ĝin, ĉar tiuokaze mia diveno tamen estus ĝusta."

Sed kiel dirite la krokodilo estas maljuna kaj do ruza. "Ne, ĉiuokaze mi manĝos la infanon. Se vi ĝuste divenis, mi manĝos, ĉar alie via diveno estus neĝusta. Se vi neĝuste divenis, mi ne devas redoni la bubon, ĉar mi promesis fari tion, nur se vi ĝuste divenis."

La malfacilo estas en tio, ke la estonta redono aŭ manĝo dependas de la antaŭa diveno, kies ĝusteco siavice estas ligita al la posta okazo. Alivorte: la kaŭzo estas dependigita de sia sekvo.

Kio estas vera? — Diversaj logikoj.

La klasika logiko konas du aliajn ĉefprincipojn, sur kiuj ĝi staras. Unu estas la principo, kiun oni plej ofte indikas per ĝia latina nomo, principium tertii exclusi. Ĝia enhavo estas, ke iu aserto aŭ juĝo estas vera aŭ estas nevera; tria eblo ne ekzistas. La alia estas la t. n. identoprincipo. Laŭ ĝi iu afero ne povas samtempe esti alia afero.

Ankaŭ tiuj du principoj aspektas unuarigarde tre konvinkaj. Estas do ne mirige, ke ili regis dum jarcentoj en la filozofio kaj en la ekzaktaj sciencoj.

La donitaj ekzemploj, en kiuj la aserto kaj ĝia malo ambaŭ estas ne tute veraj (la kamelcono, facile de esperanto k. c.) tamen evidentigas, ke ankaŭ la principo de la ekskluzivita tria ne havas absolutan validon.

Sir James Jeans, la fama angla fizikisto, prave demandis, en kiu momento iu transiras de juneco al maljuneco, se oni rekonas nur la nociojn juna kaj maljuna. Ĉu ni povas diri, ke iu hodiaŭ estas juna kaj morgaŭ subite maljuniĝos? Certe ne.

Lastatempe ŝanceliĝas eĉ la principo de idento. En la atomfiziko oni jam kutimiĝis al la penso pri la amfibicca karaktero de materiaj croj: protonoj, neŭtronoj, elektronoj k. c. Jen ili aperas kiel veraj materiaĵoj, jen kiel nuraj ondosistemoj. Kvankam la du konceptoj estas esence kontraŭaj inter si, oni tamen devas akcepti ilin ambaŭ por povi interpreti fenomenojn trovitajn dum la lastaj jardekoj. Nenia korekto aŭ ŝanĝo de teorio povis ĝis nun solvi tion. Kaj tiu akcepto signifas, ke en la atomfiziko oni flankenmetis la identoprincipon. La logiko de la atoma mondo ŝajne estas alia ol en la mondo, kiun niaj sentumoj perceptas.

Kelkaj logikistoj rigardas sian sciencon kiel formalan sistemon, en kiu oni, komencante per nepruveblaj bazaj aksiomoj aŭ principoj, povas pruvi diversajn teoremojn, same kiel en geometrio kaj algebro. Se oni ŝanĝas la komencajn principojn, sekvas aliaj teoremoj, do estiĝas alispeca logiko. Kiu permesas en sia logiko nur tiajn asertojn, kiuj estas absolute veraj aŭ absolute neveraj, tiu akiras specon de logiko pli malpli simpla, t. n. duvalida logiko.

Kiu akceptas trian eblon inter vera kaj nevera — meze vera, ebla, probabla aŭ io simila — havas alian logikon, trivalidan. Laŭ lia koncepto homo povas esti nek juna nek neĵuna, sed mezaĝa, nek klera nek stulta, sed klereta. Estas klare, ke lia logiko estas pli konforma al la ĉiutaga realo sed ankaŭ malpli simpla.

Tria persono forĵetas principium contradictionis, kaj lia logiko havas alian karakteron ol la du antaŭaj.

Malgraŭ tiu diverseco ĉiu logiksistemo estas orda tuto. La esencaj diferencoj estas ne tro multaj, kaj eble estas troveblaj la komunaj trajtoj, kiuj konsistigas la fundamenton de la diversaj sistemoj, tiel ke oni povos difini al ĉiu ĝian validokampon.

Supozeble mi ne plu bezonas emfazi, ke la logiko ne povas doni verojn kvazaŭ aŭtomato, en kiun oni metas moneron. La logiko ne estas fonto de vero. Ĝi povas nur iom helpi ĉe serĉado de vero kaj gardi, sistemigi akiritajn verojn. Ni devas ofte kontentiĝi per supozoj kaj probabloj, ĉar "la vero estas vualita".

Malgraŭ siaj limoj la logiko estas valora kaj admirinda pro-

dukto de la homa pensado. Ĝi similas al brila diamanto kun diversaj facetoj. La briloj de la diamanto allogas nin, sed ni ne forgesu, ke ĝi estas kaj restas senanima objekto, kiu ne respondas al la bezonoj de la koro.

Diamantoj estas uzataj ankaŭ kiel laboriloj en la industrio. Pro ilia hardeco oni uzas ilin por tranĉi, ĉizi, torni malmolajn materialojn. Tiel servu la logiko. Ĝi estas studinda ne nur en si mem sed por servi ĉe traktoj kaj solvado de komplikaj intelektaj problemoj.

Ne nur la laboro sed ankaŭ la laboriloj meritas zorgon de la laboranto. Oni kritike observu la uzatan logiksistemon por kontroli, ĉu ĝi taŭgas por plenumi bezonojn de ekzakta scio.

Labormetodoj kaj laboriloj evoluas, pliadaptiĝas kaj specialiĝas. Komence estas unu maniero kaj unu ilo por ĉio, poste la procedoj multiĝas kaj speciala ilo estas kreata por ĉiu aparta speco de laboro. Kredeble estas tiel ankaŭ rilate al la logiko, kiu estas speco de mensa tekniko.

Grava rimarkigo

(De la redaktoro)

Se mi jam antaŭe estus sciinta, ke "Germana letero" en nro 3/49 kaŭzos tiom da bruo kaj tiom da fortaj vortoj, mi tamen estus ĝin aperiginta. Ni esperantistoj pretendas, ke ni agadas por paco, internacieco kaj frateco. Se nia pretendo estas scioza, ni devas esti kapablaj sincere kaj per vortoj adekvataj al la realaj cirkonstancoj pritrakti inter ni la diversajn vidpunktojn kaj pensmanierojn, kiuj troviĝas ĉe anoj de diversaj popoloj kaj de diversaj popolgrupoj. Se ni fervore parolas pri samideaneco kaj amo sed zorge evitas rekte tuŝi ĉiujn interhomajn kaj interpopolajn konfliktojn, nia agado malmulte utilas. Tiel ni en diversaj popoloj kaj diversaj homgrupoj konservas en nia interno niajn antaŭjuĝojn kaj agoregantajn sentojn — agoregantaj en decidaj momentoj. Sed malantaŭ la dorso de niaj

malsame pensantaj samideanoj ni eble klarigas, kiaj homoj ili estas. Tio ne proksimigas nin unu al alia.

"Germana letero" estis persona letero al mi. Ĝi ne havis rubrikon, kaj ĝi ne estis sendita por aperigo. Ĝi tamen pritraktis temon, kiun mi estis tuŝinta kaj kiu havis rilaton al MR, krome mi konsideris ĝian esencan enhavon atentinda. Tial mi proponis aperigon. Ekzistis kaj ankoraŭ ekzistas multaj homoj, kiuj juĝas homojn kulpaĵoj kaj ekstermindaj nur pro tio, ke ili apartenas al certa popolo aŭ certa popolgrupo, en kies nomo iu malbono estas farita. Aperigante ĝin mi atentis pri tio, kio — laŭ mia koncepto — estas senco kaj celo en ĝi, sed malpli pri la esprimmannero. Tiu kaŭzis misinterpreton — laŭ mi la interpreto de sinjorino Bünemann same kiel tiu en la nuna numero de sro J. Kohen-Cedek estas misinterpretoj de la efektivaĵoj senco kaj celado de la aŭtoro.

Kiam mi nun pretigas la materialon por nro 2/50 de MR, mi preskaŭ samtempe ricevas du leterojn pri tiu demando, unu de la aŭtoro de la "Germana letero", alia de J. Kohen-Cedek laŭ komisio de Israela Esperanto-Ligo. La lasta estas fortesprima, kaj en la fino ĝi asertas, ke la tuta hitleraĵo kaj ĝiaj krueloj havis sian kaŭzon en la germana naciajma psikotrajto, kio povas signifi nur tion, ke ĉiuj germanoj havas la psikotrajtojn de la mensodifekta Hitler. Mi facile komprenas, ke judoj povas tiel senti kaj skribi post la turmentado kaj ekstermado dum la hitlerpoko. Malgraŭ tio la aserto estas raskoncepto de la sama speco, kiun tiom da germanoj havis pri la judoj. Al tiaj germanoj la aserto estas la eĉo de ilia propra voĉo; al la ceteraj ĝi estas ofendo.

Kiel nun fari? Ĉu rifuzi la novan germanan leteron? Kiam vi estos ĝin leginta, vi certe konsentos kun mia aserto en nro 1/49, ke ĝia aŭtoro estas nek hitlerano nek antisemito, kaj eble eĉ ŝajnos al vi, ke li estas homo, el kiu elbrilas la sama granda germana humanismo. Al mi ŝajnas tiel.

Ĉu rifuzi la israelan leteron? La judoj rajtas paroli, en la hitlera demando eĉ unuavice. Se ili pro fortaj sentoj troigas aŭ eĉ se ili efektive havas la menciitan raskoncepton pri la germanoj, ili rajtas paroli.

Aŭ ĉu rifuzi ambaŭ leterojn kaj fini la diskuton. Ne. Mi

konscias, ke multaj legantoj eble ne ŝatos tian diskuton, ke ili eble diros, ke ne estas dece, ke esperanta revuo aperigas tiajn leterojn.

Kiamaniere interkompreniĝi, se ni ne tolerus aŭdi la konceptojn de malsame pensantaj homoj? Sed la celo de esperantistaj diskutoj pri tiaj problemoj devas esti klarigoj kaj pli bona kompreno, ne malamika batalo por venko. Venki devas ne ni sed la vero.

Tia diskuto efektive estas probilo pri nia sincero. Se ni estas tiaj esperantistoj, kiaj ni pretendas esti, ni kapablu fari tian diskuton en inda maniero, laŭ faktoj kaj racia pensado, estimante homojn kvankam kritikante tiajn konceptojn ĉe ili, kiuj laŭ ni estas eraraj, konfesante proprajn miskonceptojn, kiam ni trovas, ke ili estas neĝustaj. Se ne — ni ne estas pli bonaj ol tiuj, kiuj kaŭzas konfliktojn kaj militojn.

S. Engholm.

Nova germana letero

Ĉiam ŝatinte konversacion kun prudentaj homoj, mi tamen ofte evitis unu temon: la politikon. Certe politiko ofte estas afero ne logika, sed aliflanke ĝi ne taŭgas por esti forte influata de sentimentoj.

Tamen mi nun ne povas ignori la atakojn, ili estas tro fortaj kaj maljustaj, mi devas respondi al la "respondo". Tio ne estas facila. Ja mi ne volas — precipe ne kontraŭ sinjorino — repagi per la sama mono, t. e. per ofendoj kaj insultoj. Ŝi ja diras, ke mi ne liberigis min de la malnova pensmaniero, ke do mi estas (kaj estis) aprobanto de la hitlera perfortpolitiko kaj de rasmalamo (ke do mi estas antisemito). Krome: ke mi "verkis perfektan pamfleton por (do intencante) denove vivigi antisemitismon". En vero estante homo, kiu ĉiam rigardis kolektivajn malamon pro rasaj sentimentoj kiel stultajn de primitivuloj, mi sentas ĉi tiun maljustan akuzon kiel gravan ofendon.

S-ino B. diras, ke ŝi "volas eduki la junan generacion". Bone, sed ĉu oni montras bonan edukilecon aŭ apartan talenton por eduki, ofendante kaj suspektigante homon, kiun oni ne konas? Homon, kies senriproĉa vivo lin rajtigas pretendi por si la laŭhoracan Integer vitae scelerisque purus.

Mi legis la "respondon" al malnova ĉi tiea esperantisto. Kelkfoje kapneinte li laŭte ekridis, legante ke mi estas suspektigata pri antisemitismo! Efektive la iama ĉefnaculo en mia urbo taksis min amiko al judoj. Kiam foje mi renkontis lin ĉe konatoj, li minacokule memorigis, ke iam mi estis fondinto kaj ĉefo de esperantista grupo kaj kiel tia havis judojn kiel intimajn kunulojn! Kaj alian incidenton mi menciis: Dum la milito venante en oficistejon mi aŭdis, ke iu malŝate parolas pri la judoj, interalie, ke Heine estis fipoeto tute ne leginda. Nu, de mia juneco mi tre ŝatis tiun spritan poeton, kaj liaj verkoj (kiel cetero tiuj de Börne, Wassermann, Zweig k. a.) eĉ dum la nacista regado ne malaperis el mia, al ĉiuj vizitantoj videbla, libroŝranko. Mi spontance protestis kaj citante el liaj verkoj demonstris, ke H. malgraŭ multaj kritikindaĵoj estis vera poeto, kiu lasis al ni valorajn perlojn de plej bela poezio. La parolinto, kiu papage estis ripetinta ion legitan (li estis malgranda partifunkciulo), silentis, sed post kelkaj tagoj mi ricevis per komisiito de la Kreisleiter (politika distriktestro) "konfidencan" averton, ke mi gardu mian langon, kun la aludo pri eventuala arestado. (Ĉu iu kredas, ke tio igis min nacista?)

La de mi uzitan (lingve nefeliĉan, kiel diris s-ro Engholm) esprimo "judemulo", kiun cum ira et studio s-ino B. elpikis por demonstri mian "rasan malamon", mi probable estus evitinta en mature pripensita, fajlita publikaĵo, sed skribante (ne "verkante") mian *leteron* mi klopodis konvinki nur s-ron B. persone pri la (kiel tiam mi opiniis) malpraveco de lia konceptado. — Jam ĉi tiu cirkonstanco atestas, ke la aserto, ke mi verkis perfektan pamfleton por denove vivigi antisemitismon, estas kalumnia. — Cetero pri "-em-": en Valonujo ekzistis, kaj probable ekzistas ankoraŭ, frankofilaj kluboj "Amitiés françaises". Se iu nomus tiujn rondojn "francemaj", ĉu tio havus "pinton"

kontraŭ la francoj? Mi pensas, ke ne. Oni ne estu tro "spitzfindig" (sagaca)!

Mi bedaŭras, ke miaj vortoj povis miskompreni esti interpretataj, kvazaŭ mi celus ĉiujn "rusajn kaj polajn" judojn, anstataŭ nur malgrandan parton el ili. En ĉiu gento ekzistas bonaj, malpli bonaj kaj malbonaj individuoj, la juda en tio ne faras escepton. Ni trovas vere noblajn homojn, kia la atestiminda angla filantropo Victor Gollancz, sed ankaŭ aliajn, kiuj planis fari Germanujon senindustria agrarlando; plano, kiu kondamnis la plej grandan parton de la loĝantoj al morto de malsato.

Ne, mi ne estas antisemito. Heine parolis belajn vortojn, kiujn plene mi adoptas: "Mi estas amiko al la francoj, kiel mi estas amiko al ĉiuj homoj, se ili estas noblaj kaj bonaj". Tiel mi rilatas ankaŭ al la judoj. Sed faktojn oni ne povas fordisputi, ĉe ne per la argumento, ke la Goebbels-jurnaloj propagandis per ili. Tiaj artikoloj ĉi tie ne interesas, miaj ĉi-rilataj diroj koncernas la tempon de la Weimara respubliko. En tiu tempo mi foje veturis kun juda konato en fervojo. La ĵurnaloj raportis sub dikaj surskriboj pri la koruptproceso Barmat, kiu daŭris 200 tagojn kaj en kiu estis implikitaj altaj ŝtatsfunkciuloj krom la kvar fratoj B. La kunvojaĝanto montris sur tian surskribon kaj diris: „Wir deutschen Juden sind nicht erfreut über den Zuwachs", ni germanaj judoj ne ĝojas pro tiu alkreskaĵo (plimultiĝo). Kaj kvazaŭ senkulpigante li aldonis: "Konsideru, ke la negocpraktikoj en orientaj landoj estas aliaj ol ĉi tie".

Mi komprenis la honestan viron; ŝajnis al li hontige, ke anoj de lia gento tiamaniere subfosis ankaŭ lian honoron kaj bonan reputacion de fidinda komercisto. Kaj la provo, por iel ilin senkulpigi, estis tute natura kaj komprenbla reago. Li prave estus povinta diri, ke ankaŭ la altaj oficistoj, akceptinte koruptmonon kaj aliajn valoraĵojn, meritas malestimon. Aŭ ĉu, konforme al la tendenco de mia akuzintino, li estus devinta diskrii: Ni ĉiuj, mi kaj la aliaj judoj estas kulpaj pri tio, ni ĉiuj estas friponoj, malbonuloj, ĉar ja ni ne povis tion eviti kaj malhelpi? Li estis tro prudenta kaj digna fari sin ridinda figuro.

"Ich will nicht, wie Ham, die Decke aufheben von der Scham des Vaterlandes..." (volas mi ne, kiel Ham, forlevi la kovraĵon

de sur la honta parto de la patrujo...; "Scham estas sinonimo de honto kaj de seksorgano). Jen denove vortoj de H. Heine, kiu arde amis Germanujon, kvankam la tiea rigora cenzuro, ne permesante al li liberan verkadon, estis lin forpelinta Parizon, kie nostalgio pro la fora patrolando ĉiam lin suferigis. La cititaj vortoj iel ilustras la motivon de mia letero, la min kondukintan principon. Mi skribis sub la premo de honto pro la malhonoro kaj malbonfamo de la patrujo kaj de ĝiajanoj suferantaj pro la kulpo de proporcie malgranda aro da krimuloj. Mia intenco ne estis akuzi, sed klarigi, ĝustigi, komprenigi. Se en tio iel mi eraris pri tiu aŭ alia detalaĵo, oni tion montru al mi, ja ankoraŭ mi kapablas lerni. Sed oni indulgu min de insultoj, kiuj pruvas aŭ rebonigas nenion.

Principe mi estas eŭropano kaj sennaciemulo, sed dum en aliaj landoj patriotismo estas rigardata kiel memkomprenblaĵo, ĉe virto, mi ne sentas la devon malestimi aŭ malbonfamigi mian patrujon. Kompreneble tio ne malhelpas min, des pli bedaŭri kaj kondamni la malbonfarojn de multaj kunlandanoj ĝin malhonorigintaj.

Ke ni devas ŝuti cindron sur nian kapon kaj senĉese konfesi nian kulpon por rezignacie elporti ĉian punon, tiun diskon por nin "reeduki" niaj ĵurnaloj gramofonadis al ni dum kvin jaroj; estas vere ne bezone, ke germanino gurdu la saman kanton. Ankaŭ la saĝaĵon, ke estas indiferente, kion faras "la aliaj" kun ni, ni ĉiutage legis en la ĵurnaloj aŭ aŭdis radiofonie. Sed nur tiu edukanto bone taŭgas por sia tasko, kiu mem estas neriproĉinda. "Infanoj" havas akrajn okulojn por la malfortaĵoj de siaj mastroj.

Kompetentaj reprezentantoj de la germana popolo sufiĉe ofte deklaris, ke ili nepre agnoskas la devon ripari la damaĝojn kaŭzitaĵn, kiom tio estas ebla. Ke nur parto de la malbono estas riparebla, ni forte bedaŭras, kvankam ni mem unuavice estas viktimoj de la amokekurinta frenezulo. Fali sub la influon kaj potencon de demona aŭtokrato pli estas malfeliĉo kaj fatalo ol kulpo; neniu diru, ke en lia lando tiaĵo ne estus ebla. Tiaj eventoj estas sekvo de ia kaŭza evoluo. Sen la multjara terura senlaboreco de preskaŭ sep milionoj, kiu igis serĉi eliron kaj fidi al la logaj promesoj de Hitler, la nacista interregno ne estus po-

vinta radiki. Tial ankaŭ la aserto, ke "la plimulto kapitulacis en 1933 antaŭ Hitler" ne fariĝas pli vera per tio, ke oni ne laciĝas ĝin ripetadi. Estas nekontesteble, ke Hitler akiris la potencon per tute laŭleĝa vojo. Akirinte la potencrimedojn de la ŝtato, precipe la policon, tia energia kaj celkonscia batalanto jam ne estis haltigebla. Tragedie estas, ke multaj milionoj da voĉdonantoj, kiuj volis laboron kaj panon, ne militon, ne antaŭvidis la postan fatalan disvolvigon.

Mi ne voĉdonis por la hitlerpartio, sed mi ne agis tiel, ĉar mi antaŭvidis en ĝi ian gravan danĝeron, eĉ ne en la atakema parolmaniero kontraŭ la judoj. "Hundoj, kiuj bojas, ne mordas", oni diris. Nia popolo ŝajnis tro disciplinema kaj ordema por fali en senleĝecon aŭ perfortemon. La germ. revolucio de 1918 (la sola en nia historio) kompare estis sufiĉe malsovaĝa, kvankam la longa milito kun malsato kaj mizero kaj ĝia katastrofa fino estis senmoraligintaj multajn homojn. La multnombraj ŝtatestroj, forpelitaj de siaj tronoj, konservis ne nur la vivon, sed eĉ sufiĉe da posedaĵoj por larĝa vivteno. La kialo, ke tamen mi ne voĉdonis por la hitlerpartio, estis alia: Ĉiam vivinte laŭ la maksimumo de Goethe: Klerigita viro pasigas sian vivon senbrue, mi antipatis la bruon, sintrudan agitadojn, la marŝadon de uniformumitaj partianoj, la afektitan (kiel mi pensis) atakeman arogantecon. Tamen mi kuraĝas diri (spite al tio, ke oni denove diras: jen vidu la naculon!), ke la "ĝisfundaj kontraŭuloj, ne povante trovi almenaŭ ion bonan en la hitlera politiko", iel blindigite de malamo miskonas la efektivecon. Kial mi diras tion? Ĉar tio ribeligas mian senton por justeco, ke tiel oni rigardas la dekdu milionojn aŭ pli da voĉdonintoj por Hitler (inter kiuj kompreneble estis ankaŭ naciistoj kaj antisemitoj) kiel amason da stultuloj aŭ krimuloj. Kiu ne kapablas rigardi tion el la *liama* perspektivo, ne laŭ la spertoj poste akiritaj, tiu ne juĝu sed preferu silenti. Unu el la iamaj intimuloj de Hitler, Gauleiter (polit. provincestro) Joseph Wagner, poste mortigita en koncentrejo, skribis, ke li estas profunde konvinkita, ke H. dum la lastaj jaroj, almenaŭ post 1942, estis freneza. Efektive la lastjaraj faroj de H., precipe la kruclega kaj politike tute sen-senca mortigo al judoj, povis ĝermi nur en malsana cerbo. Sed

la "Führer" de 1932 estis tro genie sagaca kaj ruza por prezenti programon, "en kiu oni ne povis trovi almenaŭ ion bonan". Oni ne forgesu, ke miloj da ĵurnaloj de la aliaj partioj akre batalis kontraŭ la relative malmultaj naciistoj.

Strange estas, ke alilandanoj ofte estas pli klarvidaj kaj justaj ol germanoj mem. Ekz. la angla publicisto Lidell Hart skribis la 3. 9. 49 en "Picture Post": "Por la celoj de la nürnberg-proceso sufiĉis la tezo, ke la milito kun ĉiuj siaj sekvoj estas imputinda al la atakemo de Hitler. Sed tiu klarigo estas tro simpla. Ĝi ankaŭ ne konkordiĝas kun la faktoj, ĉar Hitler volis preferi ĉion alian, ol mondmiliton. La germ. popolo kaj aparte la germ. generaloj timis antaŭ tia milito, kaj la memoro pri la unua mondmilito estis ankoraŭ tre viva. Hitler mem, malgraŭ sia senskrupulco, dum longa tempo montris rimarkindan singardon en la efektivigado de siaj celoj. Kaj la armeestroj estis ankoraŭ pli singardaj. Post la militfino la esencaj germ. arkivoj falis en niajn manojn, kaj ni povas fari al ni precizan bildon pri la eksterordinara grado de timo antaŭ milito inter la germ. estroj. — Kiel do fariĝis la milito, kiun Hitler propre volis eviti? La vera militkaŭzo konsistas en la kuraĝigo, kiun la okcidentaj potencoj influis al Hitler ĝis la printempo 1939" ktp. (Esperantigite laŭ germana traduko).

S-ino B., vidante gravan hiaton en mia instruiteco, rekomendas al mi studi la historion. Nu, tiu studado instruis al mi alian konsideradon kaj konkludon. Mi lernis, ke la historio troviĝas inter la orbitoj, kie la leĝo pri kaŭzo kaj efiko estas evidente aganta. Provante montri al s-ro Engholm, kiakaŭze antisemitismo povis kreski en Germanujo, mi estis konforma al tiu sperto. Rekomence al la tre atentinda rekomendo mi konsilas legi ekz. la verkon de Mignet, Histoire de la révolution française, en kiu la verkinto majstre disvolvis la kaŭzativan interligitecon de antaŭ- kaj prirevoluciaj okazaĵoj. Pli interesa eble estos la legado de Das Reich der Dämonen (la regno de demonoj), grava prihistoria verko de Frank Thiess, kiun subtitole li nomas "la romanon de jarmilo". En ĝi li diras, ke ankaŭ la terura kaj malbona, faranta ĉiun historio-esploron vere malĝojiga laboro, perdas sian meduzan, rigidan aspekton, se oni enigis la videblajn eventojn de historia spaco en *kaŭzoĉenon*.

Cetere jam Schiller postulis enkonduke al la rakonto "Krimulo pro perdita honoro", ke historiistoj pritraktu la historion laŭ tiaj kaŭzorilataj konsideroj.

Restas la tasko, defendi min kontraŭ la akuzoj, ke mi ne liberiĝas de la malnova pensmaniero = hitlerismo. Por tio mi devas sciigi iom el mia privata vivo, kion nur malvolonte mi faras, ĉar ĝi estas nur mia persona afero kaj mi ne intencas iel vekti kompaton. Ankaŭ mi ne volas disvolvi la tutan ĉenon de miaj ĉi-rilataj ĉagrenoj, sed por demonstri, kiel min malfavoris kaj fitraktis la ĉi ticaĵoj partiestroj, mi diru nur jenon, cetere ĉiel pruveblan. Ĝi vundis min pli ol ĉio alia, kio koncernas min individue.

En la komenco de la milito oni devigis nian servistaron labori en municifabrike. Ŝi estis inter la unuaj tiel devigitaj, dum en multege da mastrumoj sin trovis servistinoj nerekviziciitaj, ofte eĉ du aŭ tri. Mi protestis argumentante, ke mia edzino, 60-jara kaj malsanema, ne povos sola fari la laboron en unufamilia domo kun nemalgranda ĝardeno. Krome la servistino estis ĉe ni jam pli ol 15 jarojn, aĝis 46 jarojn, kaj ŝia sano ne estis sufiĉe fortika por fabriklaboro. Sed la klopodo estis vana, male, por ke mia 20-jara filino ne povu helpi al la patrino, oni mobilizis ŝin, kvankam ŝi laboris en apoteko kaj estis faronta sian fakekzamennon post nelonge. Ankaŭ ĉi tie miaj klopodoj kaj tiuj de ŝia influa mastro ne sukcesis. Tamen mobilizo de virino tiam ankoraŭ estis eksterordinaraĵo, ĉar ekzistis ankoraŭ sufiĉe da volontulinoj ne ŝatantaj fabriklabori. Krome filinoj abundis, kiuj tute ne aŭ nur ŝajne (ĉe patro aŭ parenco) praktikis profesian laboron.

Mia filino antaŭe estis sana, mi ne memoras, ke iam ŝi estis malsana krom negrava afekcio de morbiloj. Kiam post du jaroj oni malmobilizis ŝin, ŝia sano estis ruinigita. Ŝi devis deĵori ĉe posteno tre danĝera, ofte atakata de bombaviadiloj. Restis kora-fekcio kaj nerva ekscitiĝemo, jam ne forigeblaj.

Dume mia edzino kurage pengadis plenumi sian sizifan mastrumlaboron, sed la trostreĉado de ŝiaj fortoj, la psika premateco per la militumaj okazaĵoj, la progresanta manko de nutraĵoj, precipe de grasaĵo, malfortigis ŝin pli kaj pli. Kiam fine (ŝi pezis jame nur 38 kg) oni permesis servistaron — dek-

kvarjaran! — la stato de ŝia sano estis malbonega. Ŝi mortis antaŭ la militfino. — Ĉu iu, sciante rezoni kaj logike konkludi, kredos, ke mi estas aprobanto de sistemo, kiu tiel min suferigis? Kaj krome, ĉu la partiestroj, kiuj per sia stabo de kontrolistoj kaj spionantoj estis ja bone informitaj pri pensado, sinteno kaj inklinoj de ĉiuj personoj, estus tiel min persekutintaj, se mi estus tia, kia s-ino B. min rigardas?

"Ni germanoj ne sukcesis liberiĝi nin mem de la nacisocialismo." Ĉu en tiu "nerifutebla fakto" oni vidas kulpon? En tiu kazo la germ. popolo ne sola portas kulpon. Ĉirkaŭrigardante ni vidas multajn ŝtatojn, kies loĝantoj estas subigitaj sub politikaj sistemoj, kiajn libercamaĵoj popoloj kondamnas. Sed ĉu vere nepoveco de pli aŭ malpli granda parto de civitanoj estas kulpo kaj kulpo de ĉiuj? Mi pensas, ke mi ne bezonas respondi ĉi tiun demandon. — Kaj pri la realigebleco de la bela revo kaj idealo pri "granda rondo familia" mi supozeble ne estas la sola skeptikulo en Esperantujo, ĝuste pro tio, ke mi studis la historion, kiu laŭ Schiller estas rezultigata per la neŝanĝebla strukturo de la homa animo kaj per la varieblaj kondiĉoj influantaj ĝin de ekstere.

Kaj al tiuj el la legantoj, kiuj eble emfaze kontraŭas: "Sed ni bazos nian venontan socisistemon sur la racio!" mi respondas per jenaj vortoj de la supre citita epikulo Thies: "Oni vidas (studante historion) kun teruro aŭ mirego, ke eĉ historio de militoj, revolucioj, ŝtatfondoĵoj kaj jurokrcioj ĉiam denove evidentiĝas kiel agoj el animaj aŭ subanimaj fontoj. Kaj ke la racio, tiu danaa donaco de la dioj, plenumis apenaŭ pli ol ekzekutivan funkcion, simile al soldato, kiu plenumas ordonojn, kies celo kaj kialo restas al li nekonataj." — Jam ofte oni surtroniĝis la diinon Racio, anstataŭ tiun de la Amo kaj Toleremo. La ekregado de homa racio kostis multe da sango kaj da larmoj. Vestigia terrent.

Israela Letero

de J. Kohen-Cedek

La letero de sinjorino Bünemann en nro 1/50 povus sufiĉi kiel respondo al "Germana letero" en nro 3/49. Poste venis la sekvanta letero, verkita de sro Kohen-Cedek laŭ komisiono de Esperanto-Ligo Israela. Ankaŭ la judoj rajtas paroli. Tial MR aperigas ankaŭ tiun ĉi skribaĵon.

La aŭtoro (ne subskribinta) de "Germana letero" en nro 3/49 de MR deziras konvinki nin, ke la germanoj ne respondas pri siaj militkrimoj, eĉ pli, ke ili grandparte nenion sciis pri la faritaj abomenaj kruelaĵoj.

La sopiro de la leterskribinto al rehonorigo de sia nacio estas komprenebla: ne estas oportune aperi publike en bona societo, kiam la frunto estas markita per la signo de Kain. Tamen la aserto, ke la plejmulto de la germanoj nenion sciis pri la sistema ekstermo de homoj en la konkeritaj landoj, sonas kvazaŭ certigo, ke ĉiuj germanoj estis denaske blindaj surdmutuloj.

La amasajn masakrojn en Auschwitz, Majdanek, Treblanka, Bergen-Belsen kaj ĉie aliloke antaŭis multjara laŭplana populceduko, kiu preparis multajn legiojn da ekzekutistoj, amasedukado grandskale aplikita per gazetaro, kvazaŭscienco, bel-literaturo, prelegado, radio, filmo, teatro, per ĉiuj teknikaj rimedoj de la moderna propagando. La tuta mondo aŭdis la propagandon kaj levis la ŝultrojn pro mirkonfuzo.

En 1933 komenciĝis senbrida persekuto kontraŭ judoj en la propra germana hejmo. Oni publike batis kaj turmentis homojn, senkaŭze arestis kaj sendis en koncentrejojn, forpelis ilin el tramoj kaj teatroj, eksigis de postenoj, devigis ilin cedi havaĵon kaj elmigri. Altrangaj sinjorinoj estis ordone devigataj lavi la pavimojn, marŝi sur la stratoj kun ofendafiŝoj surdorse. Infanoj estis rabataj de gepatroj kaj kondukataj vintre en limarbarojn kaj tie lasataj en neĝo por morti inter lupaj dentoj. La kontraŭjuda agado kroniĝis per impona tutlanda pogromo, kun kadavroamasoj kaj fumhaladzo de forbruligitaj judaj librokollektoj kaj sinagogoj. La tuta mondo vidis kaj aŭdis. Ne vidis kaj ne aŭdis, verŝajne, la germanoj mem ...

Sed la mondo estis jam parte venenita de germana influo kaj parte terurita de danĝertimo, kaj ĝia indigno ne eksplodis per aktiva protesto, en formo de kontraŭagoj. Konvinkitaj pri senpunteco la germanoj tiam aplikis la saman metodon al sialandaj ĉeĥoj kaj poloj. La mondo silentis kaj preparis sin por nova milito.

Ĝi venis. En ĉiuj konkeritaj urboj de Polujo, de la baltaj landoj kaj Ukraino la unua faro estis amaspaŝado de tieaj judoj. La restantajn oni enfermis en getoj por iompostioma deĝenero de malsato kaj por poioma turmentbuĉado. De tempo al tempo oni forkondukis el la getoj martirkaravanojn al fiksitaj ekzekutejoj. Samtempe ekfunkciis organizita eksportado al Germanujo de la rabakiraĵo. Per poŝtpaketoj liveris la soldatoj al siaj familianoj la havaĵon hereditan de la viktimoj. Milionoj da soldatoj estis okupitaj per sistema homekstermo, pluraj milionoj da civiluloj ĝuis la rabakiron. Sed ... neniu (laŭ la aŭtoro) sciis, kiamaniere ĝi estis akirita kaj je kia prezo! Dum ses militjaroj oni provizis sin per vestoj, ŝuoj, nutraĵoj kaj mebloj ne konante la provizfonton. Por tio oni devas posedi specialan talenton de nekompreno.

Por vaste prepari la konkeritan "vivspacon" al germana koloniigo ne sufiĉis ekstermo de judoj. Tial ekfunkciis aparta likvidsistemo por ĉeĥoj, poloj, blankrusoj, ukrainanoj kaj ĉiuj aliaj popoloj de la orientaj regionoj. En la konataj gasĉambroj, forbruligejoj kaj aliaj mortiguzinoj estis buĉataj per sataneccelpensitaj, sadisme rafinitaj torturoj ĝis sep milionoj da judoj kaj nedeterminbla nombro da milionoj da aliaj diversgentanoj.* Tiu ekstermado okupis grandan servpersonaron, plejparte eksterarmean. Sur la bazo de la homekstermo estis fondataj multaj utilaj industrioj: por fabrikado de brosoj, balailctoj kaj perukoj el homharoj, ledo kaj pergameno el homhaŭto, eltiro de oro el ŝtopitaj dentoj, eligo de homgraso kaj preparo de sapo el juda karno. Miloj da laboristoj estis okupitaj en tiuj fabrikoj. Komercistoj aĉetadis vestojn de mortigitaj viktimoj, kamparanoj aĉetis cindron de la forbruligoj por nutrado de la

* La faktoj pri germanaj kruelagoj supre kaj poste menciitaj, per fotoj pruvitaj, estas ĉerpitaj el la trivoluma kvodlibeto: "Dokumentaro" eldono GIZ (regnestrara), Moskvo 1945, rusingva.

tero. Kuracistoj eksperimentis pri kontraŭsufera rezistpovo de homoj, injektante bakteriojn, benzinon kaj aliajn kemiaĵojn kaj elĉerpis ĝis la lasta guto la sangon de malgrandaj infanoj por kuraco al sangomankaj, vunditaj soldatoj. Milojn da knabinoj oni forkondukis por kanibalaj amuzoj de malsobraj armeanoj, kaj sub iliaj koloj oni tatuis ilian destinton: "por soldatoj" aŭ "por oficiroj". Centmilojn da sklavlaboristoj, viroj kaj virinoj, oni kondukis el orienta Germanujo al fabrikoj, bienoj kaj por privatuloj, kie oni ŝvitlaborigis, vipopunis kaj malsatigis ilin. (Laŭ la leteraŭtoro "ili faris preskaŭ nenion", sed la skribanto de tiuj ĉi linioj parolis kun kelkaj dekoj el tiuj, kiuj travivis tion.)

Resume: dum milionoj da germanaj soldatoj faris sian pure surfrontan laboron kaj dum miliono da civiluloj partoprenis rekte aŭ pere la hombuĉadon, la cetera nacio dum ses jaroj ĝuis la materian avantaĝon de la homekstermado. La tuta mondo ĉion sciis. La fumo de la mortfabrikoj kovris la sunon, ĝia haladzo venenis la acron de tuta Eŭropo, la ĝemkrioj de la agonie baraktantaj viktimoj atingis la mondrandojn. Sed obstine ŝtopis la orelojn kaj ŝirmis la okulojn la bonkoruloj de la tipo de nia leterskribinto: li nenion aŭdis kaj nenion vidis. Dio potenca! Ĉu li estas nesuperebla naivulo, ĉu li supozas nin ĉiujn tiajn?

Dezirante cliri pura el marĉakvo kaj rehonorigi sian popolon la leteraŭtoro penas se ne pravigi la germanan antisemitismon almenaŭ klarigi ĝiajn kaŭzojn kaj influi la legantojn en la senco "ĉion kompreni estas ĉion pardoni". Elektinte la oportunan vojon de la plej malforta rezisto li demetas la akuzoŝarĝon de la larĝaj germanaj ŝultroj, rementante ĝin sur la dorson de iamaj germanlandaj judoj, defendante la tezon, ke pri la judomalamo kulpas la judoj mem. Bone, konsentu ni kun la aŭtoro. Ni demandu nur, ĉu la indigna alta moralsento de la germanoj ne povis eltrovi alian punrimedon al tiuj kulpuloj ol kompletan popolekstermon. Ĉu la germana justeco kutimis *fari sapon* el la propranaciaj ŝtelistoj? Antisemitismo ekzistas en multaj landoj. Neniu judo postulas: "Amu min!" sed ankaŭ la antisemitisma praktiko povas kaj devas esti bridita en kadro de certaj civitaj formoj. Tiuj dependas de la kultureduka

kaj civitmorala nivelo de la koncerna nacio. En Anglujo, ekzemple, la antisemitismo montriĝas en neakcepto de judoj en certaj fermitaj socirondoj, en la antaŭmilita Polujo ĝia kutima formo estis stratincidentoj kaj de tempo al tempo pogromoj. Sed en Germanujo ĝi kroniĝis per masakro de preskaŭ 7.000.000 da homoj. Mi jam diris: dependas de popolmorale, maniereduko kaj... temperamento.

Pro kiaj krimoj la judoj meritis sian sorton? La aŭtoro akuzas ilin pro aparteno al socia grupo, kiu "ne korpe laborante, ne produktante ekonomiajn valorojn, rikoltis, kie ili ne estis semintaj". Kaj ĉar "malsatante la profesiojn de manlaboristo kaj terkulturisto ili estis riĉiĝintaj precipe per komerco. La bankkapitalo estis plejgrandparte juda" ... ktp. Jen kial ili meritis la gasĉambrojn! Bone, sed kial la havcnaj ŝarĝportistoj de Saloniko, la ŝpinistoj de Lodz, la koloniistoj el Krim, la karbministoj el Donbas? Estus interese ekscii ankaŭ tion, ĉu la miliono da infanŝuetoj, trovitaj en la magazenoj de Treblanka, troviĝis sur la piedetoj de fikomercistoj aŭ de akciuloj de Reichsbank. Naivuloj kreu je sincero de tiaj argumentoj!

La germanaj judoj, asertas la skribinto, estis ekonomie ne produktiva elemento. Sed parolante pri ilia socia rolo li mencias: "La plej grandaj eldonejoj estis judaj, radiofonio, filmo estis regataj de judoj ... Pli ol ses dekoj de la docentoj pri medicino estis judoj. Ili forte influis ankaŭ la juĝadon." Ĉu la legantoj atentis? Juĝistoj, kuracistoj, libroeldonistoj, dramistoj, artistoj — ili ĉiuj estas "ne produktiva elemento"! Kaj tiuj "ekspluatantoj de la laboristaro tamen arogis al si la rolon de popoltribunoj, por forturni per tio la atenton kaj akiri eĉ la simpatian de la laboristoj." Do, estimataj legantoj, ni ĉiuj vivis en granda memtrompo: ni ne sciis, ke Ferdinand Lasalle, Karl Liebknecht, Roza Luxemburg kaj Ernst Toller estis nuraj agentoj de Barmat, Kutisker kaj ceteraj judaj fisppekulistoj kaj trompnegocistoj! Kaj, kiu scias, eble ankaŭ Karl Marx mem estis pagita agente de la familio Rotschild? Kiu tiukaze estis la vera defendanto de la laboristaj interesoj? Verŝajne nur Adolf Hitler!

Kaj ĉar tiuj judoj, dank' al siaj spiritaĵoj kvalitoj superantaj la germanan filistiroaniman naturon, impertinente atingis la

plej altajn ŝtupojn de kultura kaj socia vivo, la nobelaj purrasanoj ekribelis. Ili rompis la fremdjugajn sklavkatenojn, demetis la kulturen laŭkronon de la firasaj uzurpintoj kaj dronigis Eŭropon en sangdiluvo! Jen, legantoj, kien konsekvence kondukas la logiklinio de la judmalama ideologio. Groŝon valoras tiuj sin mem kontraŭdirantaj argumentoj. La leteraŭtoro troviĝis antaŭ nesolvebla enigmo: kiel estas klarigeblaj la evidentaj germanaj kruelagoj? Kaj li sincere konfesas: "Mi ne povas ilin klarigi".

Multaj germanoj trovis pretekstan elturniĝon de tiuj akuzoj. Ili diris: "La reĝimo devigis min fari tion kaj tion." Tia respondo kompreneble ne povas ilin absolvi. Ĉar liberan, moralan personon *neniu* povas iam ajn devigi al mortigado, se li ne emas mem tion fari. Eble estas interese al la legantoj ekscii la judan sintenon rilate al tia principo: "Ĉiujn krimojn laŭ la Instruo — se oni diras al homo: 'faru ilin, kaj vi ne estos mortigata' — li faru ilin por ne esti mortigata, *escepte de idolservo, malĉastaĵo kaj sangoverŝo.*" (Talmudo, traktato "Sinedrio", ĉap. 8.)

Sed nia leteraŭtoro honeste ne uzas la pretekstan motivon, kaj la germanaj kruelagoj restas ne klarigitaj.

Verdire, ili restos neklarigeblaj, se oni timos rigardi rekte en la vizaĝon de la vero; ĉar ĝi estas fiaĉe sangomakulita; ĉar anstataŭ la vizaĝo de doktoro Jekyll timtremigos nin la monstra aspekto de mr Hyde. Ni estu honestaj, ni serĉu la respondon tie, kie ĝi troviĝas: en la germana *nacianima psikotraĵto*.

Memoru ni, el kiaj sovaĝaj gentelementoj formiĝis la germana nacio, kian sangomaron kaj kian kadavromonton ĝi transiris, ĝis ĝi pereigis la klasikan mondon. Memoru ni, kian barbaran rolon ĝi plenumis tra la tuta meza kaj nova epokoj, kun siaj mortportantaj devizoj "Drang nach Osten", "Deutschland über alles!" kaj fine "Lebensraum". Memoru ni, kiel Germanujo preparis la unuan provon de mondkonkero, kiarimede ĝi penis ĝin efektiviĝi, kaj en kian senmoralan abismon ĝi enfalis post la fiasko. Ni konsideru, kian senton de malplivaloro la germanoj ricevis pro tio, kaj kia freneza troficio pri "superhomeco" naskiĝis en la kripligita germana popolanimo. Tiam klariĝos, ke la specifa germana kruelco, same kiel ilia jud-

malamo, estas krimo fontanta ne nur el envio, netoleremo kaj malamo" (p. 6, substreko mia). Tiam evidentiĝas, ke la germanaj kruela sangavido kaj cinika, sovaĝa bruteco estas denasknaturaj tro disvolviĝintaj animtraĵtoj, atavisme renaskiĝintaj kaj hereditaj de praaĵ besthomoj. Tiuj animkvalitoj, plifortigitaj de degenera atrofio de homaj etikaj sentoj kaŭzis la perdon de ilia morala respondoscinto. Kaj tial, se laŭ la aserto de la leterskribinto "naŭ dekonoj de la germanoj en sia konscienco ne sentas sin mem respondecaj", tio pruvas nur, kiel diris Jeremia (III, 3), ke ili "havas frunton de malĉastistino, kiu ne plu volas honti" ...

Glasgovo

de William Auld

LA HOMOJ

Vi venis
ĉar anglaj lordoj vin elpemis
el viaj ruraj* domoj
kiel kernetojn el citronoj;
ĉar vian grundon oni ŝtelis
kaj krude vin forpelis
al plia mizero kaj malsato,
por ĉasbienon krei al magnato.
Vi venis,
milope vin altrenis
el la altlando skota
(fekunda region' dezertigota)
kaj el Irland' transmare,
kie la angloj skurĝis vin barbare;
el la kampar' mortanta ĉie
vi fuĝis transmedie.
Vi venis,

* kamparaj.

kaj vin la urbo glute prenis
en sian feran ventron;
kaj tie vi generis genton
de homoj nigraj, dikaj,
malaltstaturaj sed fortikaj,
kun varma koro, lango raŭka,
humoro ironie sprito-taŭga.
Vi venis,
kaj malfacilan sorton vi eltenis:
laboromank' aŭ dekduhora tago,
enspez' nenia aŭ mizera pago;
sed evoluas vi obstine,
vaste edukas vin liberanime,
la veron socialisman vartas flame,
dum vi maŝinmiraklojn kreas ame.
Ha, homoj,
en viaj kotaj kaŭraj kestodomoj —
mi amas vin!

N O K T E

Sur ambaŭ bordoj de l'river' olca
la konstruaĵoj kunpremiĝas time,
kvazaŭ animoband' silente vea
apud malluma Aĥerono. Ŝlime
la surda akvo lekas lignofostojn,
plaŭde, gargare; ŝajne malproksime
obtuzaĵoj trenas lumovostojn
sur la dormema, peza pontoĝibo.
La vento sugestias rubomoskojn.
Sklavoj pelataj de la vivovipo,
formikohomoj pugnas, ronkas, brulas,
en la etaĝodomoj ...

Ie ŝipo
malgaje en senluna ĉerk' ululas.

Pensoj enkorpiĝas

de L. C. Deij

Hieraŭ mi admiris kelkajn ŝtonojn. Ili estis malbelaj, kaj se mi trovus ilin sur kampvojo, mi ne levus ilin. Tamen: la ŝtonoj estis primitivaj laboriloj el la plej frua infanaĝo de mia popolo. Kial oni admiras tiajn krudajn objektojn? Ĉar ili estas "prilaboritaj" kaj donas imagon pri la prilaborinto: bestoproksima sed jam pensanta kaj klopodanta homo.

Oni facile pruvas, ke praloĝantoj vere vivis en niaj regionoj. Antikva prilaborita ŝtono diras, ke iam homaj manoj klopode laboris por meti krudan objekton en pli taŭgan staton (pli taŭgan por elbati fajron, por trabori aŭ trapiki lignon, felojn, ostojn).

Tia rezono estas preskaŭ infane simpla sed ne sensignifa. Se ne temas pri praobjektoj aŭ artverkoj, la homoj ĝenerale malatentas la evidentan fakton, ke farita objekto konsistas el du aferoj: el materialo, kiun ni povas uzi kaj palpi, kaj el "plano", t. e. el antaŭe pripensita kaj ordigita aranĝo. La planon oni ne povas palpi, sed neniu serioza homo asertas, ke ĝi ne ekzistas. La "pripensiteco" de objekto estas tiel same reala kiel ĝia materialo.

Amatoro de pentroarto kopiis marpejzaĝon de van Gogh tiel lerte, ke oni facile opinius la kopion la originalo kaj inverse. Poste oni rentgenfotografis ambaŭ pentraĵojn. El la originalo restis kontura kaj ne kompleta skizo. Sed oni povis tre bone vidi, ke la restintaj strekoj estis faritaj de lerta mano. El la kopio restis krom makuloj nur difektaj kaj malcertaj skizostrekoj. Ne pensu, ke la skizo en si mem estas io grava. La plej esenca estas la penso (ideo aŭ inspiro), kiu por tiel diri gvidis la manon de la skizinto. Mi tamen trovas la historion tre instrua, pensinstiga. Imagu, ke oni povus rentgenfotografi pocmtradukojn!

Aŭto, trajno, flugmaŝino estas mirindaj enkorpiĝoj de teknika pensado. Aldone la fluliniaj korpoj kaj artaj internoj ne malofte atestas pri belosento kaj bongusto. Sed oni ne povas ne vidi, ke la enkorpiĝinta intelekto celis unualoke praktikajn aferojn: materiajn profitojn, interesojn, utilojn. Racio, kiu en-

korpiĝas en tiaj rafinitaj objektoj, eble konas formulojn pli bone ol principojn, scias kalkuli pli bone ol ami.

Ni ŝuldas tre multe al teknika pensado. Ĝi provizis niajn domojn per lumo kaj komforto; ĝi gardas homojn kaj bestojn kontraŭ malsanoj kaj malsato; ĝi faras la vivon pli longa kaj pli agrabla. Per siaj rafinitaj eltrovaĵoj la teknikistoj havas multe pli grandan influon sur la homan genton ol etikaj pensuloj kaj instruantoj. Ĉu la influo estas same valora?

La teknika revolucio kreis novan epokon. Sed la vivantoj de tiu epoko ĝenerale ne komprenas la kontinuecon de la tuta homa historio; ili ne komprenas, ke grandega spirita batalo estis necesa en la pasintaj jarmiloj kaj ankoraŭ estas same necesa por liberigi nin de la malbono. Tiel la enkorpiĝoj de brila intelekto kaj subtila pensado kondukas al novaj barbarismoj: al rapidtrafiko kaj flugmilitoj.

Pri kreado

de Karel Čapek

Fragmento el la romano "Vivo kaj verko de komponisto Foltyn." Karel Čapek.

La romano "Vivo kaj verko de komponisto Foltyn" ne temas pri iu vivinta persono; pri kio ĝi temas, evidentiĝas ekz. el la angla traduko de la verko, kiu aperis sub la konciza titolo "The Cheat" (= La trompisto). La libro estas la lasta verko de la fama ĉeĥa aŭtoro Karel Čapek (1890—1938), al kiu la morto malebligis fini la romanon. Ĝi estas verkita en maniero de atestoj de diversaj personoj pri la "komponisto" Foltyn (kiu ŝatis ŝanĝi nomon je Foltén). La prezentata fragmento estas el la lasta ĉapitro, en kiu la ripetisto Jan Trojan rakontas sian ateston pri sia unua interparolo kun Foltyn kaj poste diras:

Mi priskribas tiom vaste mian unuan interparolon kun sinjoro Foltén tial, ĉar mi opinias, ke el ĝi evidentiĝas kelkaj aferoj.

Unue, ke li vere fatale amis la muzikon kaj estis obsedata de sopiro komponi operon; li eble estus saltinta el la fenestro, se iu estus malhelpanta tion al li. Due, ke li efektive estis nur aŭtodidakto kaj diletanto, kiu staris senkonsila antaŭ taskoj, kiujn devas facile solvi ĉiu mezbona konservatorio. Trie, ke laŭ kelkaj fragmentoj, kiujn li prezentis al mi, li havis rimarkindan kaj belan talenton; des pli multe konfuzis kaj incitis min, ke apud du mirige puraj kompanaĵetoj, kiaj La knabino ĉe la puto kaj La virina ĥoro, li kontentiĝis per komponaĵeroj pli malpli banalaj aŭ kopiitaj de aliaj, kaj li eĉ ne konsciis, kia diferenco estas inter ili.

Bedaŭrinde, la unua leciono postlasis en mi ankaŭ la impreson pri tio, ke mi neniam bone interkompreniĝos kun sinjoro Foltén. Evidente li apartenis al tiuj artuloj, kiuj la arton konsideras ia memesprimiĝo kaj memvalorigo, rimedo, per kiu ili senlimigite esprimas sian propran memon. Neniam mi povis paciĝi kun tiu ĉi koncepto; mi ne povas sekreti, ke ĉio persona ŝajnas al mi esti preskaŭ malpurigo de la artula manifestiĝo. Tio, kio estas en vi, via domo, via individuco, vi mem estas nur materialo, sed ne la formo; se vi estas artulo, vi ekzistas ne por multigi la materialon, sed por doni al ĝi formon kaj ordon. Mia spiro ĉiam haltas, kiam mi legas en la Biblio: "En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron. Kaj la tero estis senforma kaj dezerta . . . kaj la spirito de Dio ŝvebis super la akvo." Li ŝvebis en malespero, ĉar ekzistis nur materialo sen formo, la materialo *senforma kaj dezerta*. "Kaj Dio diris: Estu lumo; kaj fariĝis lumo." Tion oni komprenu kiel la unuan memekkonon: la materialo konsciiĝas pri si mem kaj rigardas mirege al si mem en la unua mateniĝo; do ĉi tio estas la komenco de ĉia formado. "Kaj Dio vidis la lumon, ke ĝi estis bona; kaj Dio apartigis la lumon de la mallumo." Estas dirite: *apartigis*. Tio signifas dispecigis, limigis kaj purigis. "Kaj apartigis la akvon, kiu estas sub la firmaĵo, de la akvo, kiu estas super la firmaĵo . . . Kaj Dio nomis la firmaĵon *ĉielo* . . . Kaj Dio diris: Kolektiĝu la akvo de sub la ĉielo en unu lokon, kaj aperu la sekaĵo; kaj fariĝis tiel. Kaj Dio nomis la sekaĵon *Tero* . . . Kaj Dio vidis, ke ĝi estas bona." Sed ĉar estis dirite, ke en la

* Citajoj el la Biblio laŭ Zamenhof.

komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron, estas tiel ankaŭ esprimite, ke ne la estiĝo mem, sed nur la apartigo kaj *ordigo* estas la vera komenco kaj krea verko de Dio. Mi ne estas bibliisto, sed nur muzikisto, kaj mi komprenas tion jene: Komence estas vi mem, materialo senforma kaj dezerta; vi mem, via memo, via vivo, via talento, ĉi ĉio estas nur la materialo: ne la kreado, sed nura kreadaĵo. Kaj se vi eĉ kiel ajn malfermus vian memon kaj plenigus vian vivon, vi estas nenio pli ol la dezerta kaj ĥaosa materialo, super kiu la Spirito de Dio ŝvebas malespere, ne havante lokon por sin starigi. Vi devas apartigi la lumon de la mallumo, por ke la materialo fariĝu formo; vi devas apartigi kaj limigi, por ke estiĝu klaraj konturoj kaj la aĵoj staru antaŭ vi en plena lumo, ĉarmaj kiel en la tago de sia kreo. Vi kreas nur tiom, kiom vi donas la formon al la materialo; krei estas apartigadi kaj senĉese, senĉese formadi la definitivajn kaj firmajn limojn en la materialo, kiu estas senfina kaj dezerta. Apartigadu, apartigadu! Alie via mondo disfalos en senforman materialon, kiu ankoraŭ ne tuŝis la graco de Dio. Ja nur rigardante aŭ aŭskultante, perceptante kaj ekkonante, vi ja apartigas objektojn aŭ sonojn unu de la alia; kiel multe pli pure kaj klare, kiel severe kaj glorie vi devas ilin konturigi, se vi estas artulo, kiu provas paŝi en la postsignoj de Dio! Apartigadu, apartigadu! Eĉ se via verko estas el vi, ĝi devas komenci kaj eĉ finiĝi en si mem; ĝia formo devas esti tiel perfekte fermita, ke en ĝi ne plu estas loko por io alia, eĉ ne por vi; eĉ ne por via individueco, eĉ ne por via ambicio, por nenio el tio, en kio via memo sin mem trovas kaj kion ĝi ŝatas. Ne en vi, sed en si mem la kreita verko devas havi sian akson. Ĉiu malbona kaj nepura arto devenas el tio, ke en ĝi restis io persona, kio ne fariĝis formo kaj aĵo apartigita; tio estas nek sekaĵo, kiun Dio nomis tero, nek akvaro, kiun li nomis maro, sed koto, materialo neapartigita kaj dezerta. La plimulto de artikoloj same kiel la plimulto de homoj nur senfine plimultigas la materialon, anstataŭ doni al ĝi la formon; unuj sputas ĝin kiel inferan lafon kaj la aliaj flosamasigas ĝin kiel marĉomukon sur bordoj de akvoj; denove senĉese bolleviĝas kaj montriĝas la tero senforma kaj nesavita, atendanta la teruregan, gloran disciplinon de la kreado. Apartigadu, apartigadu! neniam

ĉesos validi kaj teruregi ĉi tiu severa leĝo, la leĝo de la unua tago.

Ĉar eĉ la diablo sin enmiksas kaj fuŝas la arton; vi povas lin facile ekkoni laŭ tio, ke li estas laŭnature ambicia kaj vantaĉa. Li paradas per materialo, originaleco aŭ fortguleco; ĉiu trograndigo, ĉiu trokresko estas fermentigita de lia infekta spiro, ĉiu glormanio kaj ĉiu parademo blovpleniĝas per lia nepura kaj afektita fiereco; ĉio, kio en la arto estas senpena, parada kaj plaĉvola, estas ŝtelamasigitaj filigranaĵoj de lia simia fanfaronco; ĉio, kio estas nepreta kaj ne finkreita estas malkvietaj postsignoj de liaj febra malpacienco kaj eterna fuŝuleco; la tuta falsa kaj parada formo estas nur elpruntita masko, per kiu li vane kaŝas sian malesperan malplenecon. Ĉie, kie laboras la artulo, same kiel ĉie, kie temas pri la homa eminentiĝo, la malbona spirito ĉirkaŭiras, serĉante sian okazon por montri sin, por tenti aŭ obsedi vin. Ĉar li mem krei ne povas, li klopodas superregi vin. Por difekti vian verkon, li difektas vin kaj elmanĝaĉas vian internon per memlaŭdo kaj memplaĉo. Por trompi vin, por ke vi ne ekkonu lin en lia efektiva kaj senforma formo, li ŝajnigas esti vi mem kaj prenas sur sin viajn interesojn. "Tio estas mi", li flustras al vi, "mi, via daimonio (interna voĉo — noto de trad.); mi estas via genia kaj ambicia memo. Dum vi havas min, vi estas granda kaj suverena; vi faras, kio al vi plaĉas; vi ne servos al iu krom al vi mem." Ĉar la diablo neniam postulas, ke oni servu al li, sed al si mem; li scias bone, kiel li tion faras kaj kiamaniere li povas regi la homajn spiritojn kaj farojn. Lia eterna mizero, sed ankaŭ lia forto, estas en tio, ke al li apartenas nenio; la mondo estas de Dio, kaj la nepura spirito ne havas en ĝi sian domon. Li povas difekti nur tion, kio ne estas lia; vi neniam scias, ĉu li ne intermiksiĝas en vian verkon; nur unu li ne kapablas: fari laboron puran kaj perfektan.

Dank' al Dio, fine mi povas paroli nur pri la arto; sed mi devis paroli pri Dio kaj eĉ diablo, ĉar neniu kredu, ke la arto estas ekster la bono kaj la malbono. Male, en la arto estas loko por pli nobla virto kaj eĉ por pli abomena malnobleco kaj malvirto ol mi konas en iu ajn homa profesio. Ekzistas arto pura, kiu klopodas fari laboron puran kaj perfektan; ekzistas

arto, en kiu la formo de la aĵoj estas apartigita kaj elaçetita, jes, mi dirus, adorita; ĉar sur aĵoj povas kuŝi io kvazaŭ klara sankteco aŭ neklara malbeno. Dependas nur de vi; ju pli multe vi amas la aĵojn, kun des pli granda strebo vi trapenetros al ilia plena kaj mistera perfekta estado. Via verko ne estas al vi taskita, por ke vi manifestigu per ĝi, sed por ke vi purigu per ĝi, liberigu vin de vi mem; vi ne kreas el vi, sed super vin; terure kaj paciencie vi klopodas pri pli bona vidado kaj aŭdado, pli klara komprenado, pli granda amo kaj pli profunda ekkono, ol per kia vi ekfaris vian verkon. Vi kreas tial, ke vi *ekkonu* sur via verko la formon kaj la perfektecon de aĵoj. Via servo al aĵoj estas diservo.

Kaj kontraŭe ekzistas arto nepura kaj malbenita ...

Jen finiĝas la teksto de Karel Čapek.

Tradukis *Adolf Stanura*.

La pluvera preludo *de Henk Valckenier*

Chopin estis malsana, tre malsana. Estis necese, forlasi Parizon. Li, George Sand — la virino kun kiu li dum dek jaroj kunvivis — kaj ŝiaj du infanoj vojaĝis al Palma, la ĉefurbo de Majorca. Sed ne estis hotelo en Palma. Nur du malkomfortajn ĉambrojn ili sukcesis lui. La manĝaĵo estis malkona kaj ne-sufiĉa sed da malpuraĵoj kaj fibestoj pli ol sufiĉe. Chopin fariĝis pli kaj pli malsana. Li komencis tusi. La najbaroj opiniis lin tuberkuloza. La domposedanto ĵetis la tutan familion sur la straton. Feliĉe ili povis trovi loĝejon en iu malnova monaĥejo en Valdemosa. Hispano, kiu pro politikaj kaŭzoj devis kaŝi sin, devis subite forkuri. Li proponis al Chopin sian loĝejon en la monaĥejo, kaj Chopin havis ĝin por 1000 frankoj.

En la komenco Chopin estis tre kontenta. Al siaj amikoj li skribis: "Mi loĝas en la plej bela loko de la mondo. Ni loĝas en granda, malnova monaĥejo ... Ĝi situas apud Palma. Ion pli belan oni ne povas imagi: arkadoj, kaj tre pozciaj tombejoj."

Pli poste li skribis: "Inter la rokoj kaj la maro, en granda forlasita monaĥejo, en ĉelo, kies pordoj estas pli grandaj ol la pordoj de Parizo, mi loĝas. La ĉelo, kiu havas la formon de ĉerko, estas alta, kaj la arkaĵoj estas kovritaj de polvo. Antaŭ la malgranda fenestro kreskas oranĝarboj, palmoj kaj cipresoj. Kontraŭ tiu fenestro, sub delikate prilaborita maŭra arabesko, staras mia lito. Flanke de ĝi staras malgranda kvadrata objekto. Verŝajne ĝi prezentas skribtablon, sed ĝi ne estas uzbla. Sur ĝi plumba kandelingo kun malgranda kandelo, komponaĵoj de Bach, skizoj de mi mem, malnovaj paperoj — kiuj ne apartenas al mi — jen mia tuta posedo!"

Sed baldaŭ montriĝis, ke la luta vojaĝo en multaj rilatoj estis fiasko. La tre granda monaĥejo estis loĝata, krom Chopin kaj lia societo, de nur 3 homoj. Ĉion, kion oni bezonis, oni devis aĉeti en la urbo. La vojo estis malbonega kaj nefidinda. Chopin ege bezonis specialan manĝaĵon sed tia ne estis havebla. Li estis vere tre malsana. Kaj ... li malhavis sian grandpianon! En la komenco li uzis tre mizeran instrumenton el la urbo, sed fine alvenis la instrumento, kiun li mendis ĉe Pleyel. (Granda pianofabro en Parizo.) Li devis pagi 300 frankojn por la transporto kaj la doganimpostoj, sed oni postulis 600 frankojn. La loĝantoj de la insulo klopodis trompi la fremdulojn ĉiel; Chopin kaj liaj kunvojaĝantoj havis malbonan famon, ĉar ... oni neniam vidis ilin en la proĝejo ...

George Sand skribis en "La historio de mia vivo":

"La granda artisto estis terura paciento. Okazis, ke li perdis la kuraĝon. Li ne posedis sufiĉe da volforto por elteni sian malsanon. Kiam li iomete resaniĝis, li vidis ĉie en la monaĥejo fantomojn kaj halucinojn. Li ne diris tion, sed mi tamen komprenis tion. Kiam mi vespere je la 10a revenis kun miaj infanoj, post nia vagado tra la ruinoj, ni kelkfoje trovis lin sidanta antaŭ la piano, mortpala, kun timigantaj okuloj kaj senordaj haroj. Pasis kelka tempo antaŭ ol li rekonis nin; li ekridis strange kaj ... ludis belegajn verkojn, kiujn li ĵus komponis, aŭ pli ĝuste, terurajn korŝirajn pensojn ...

Ekzistas unu preludo, kiun li kreis en trista, pluva vespero. Kiam ni forlasis lin, li sentis sin tute bona ... Ekpluvegis, kaj ĉiuj riveretoj transbordigis. Ni bezonis pli ol 6 horojn por iri

3 mejlojn. Nia veturigisto forlasis nin kaj ni devis vagi tra la inundojn kaj ni eĉ perdis niajn ŝuojn. En la mallumo de la nokto ni revenis hejmen. Ni rapidis, ĉar ni komprenis, ke nia malsanulo maltrankviliĝis. Li estis maltrankvila, sed lia maltrankvilo ŝanĝiĝis en rezignan malesperon, kaj li ludis la belegan preludon dum la Jarmoj fluis el liaj okuloj. Kiam li ekvidis nin, li subite ekstaris kun ekkrio kaj diris strangtonc: "Ah, mi ja sciis, ke vi estas mortintaj!" Post kiam li iomele trankviliĝis kaj vidis, en kia stato ni estas, li ekploris.

Poste li konfesis al mi, ke li, kiam li atendis nin, estis vidinta ĉion kiel en ŝonĝo. Finfine li ne plu povis diferencigi ŝonĝon de realo. Sidante antaŭ la piano li trankviligis kaj konsolis sin mem, konvinkita ke li estas morta. Li vidis sin mem, kuŝantan en la lago. Li sentis la pezajn akverojn, kiuf falis konstante sur lian bruston. Kiam mi atentigis lin, ke la pluveroj regule falis sur la tegmenton, li asertis, ke li tute ne rimarkis tion ..."

pri majuskloj

de william auld

Ĉu ne jam venis oportuna tempo, unu fojon por ĉiam forigi el nia logika kaj avangarda lingvo tiujn arkaikajn kaj senutilajn majusklojn? ili plenumas neniun servon al la lingvo, kaj reteni du apartajn skribmanierojn por ĉiu litero estas pleonasma, kaj nura postrestaĵo el tempo, kiam la latina alfabeto estis en stato de modifiĝo kaj ĉiu skribanto skribis kaj literumis pliparte laŭ sia propra kaprico. kiujn servojn ili nun teorie plenumas? nu, (oni eble respondas), ili signas la komenciĝon den nova frazo. sed tre evidente tiun fakton klare anoncas aŭ la malplena spaco ĉe nova paragrafo aŭ la punkto postmetita al la antaŭa frazo. du signoj por anonci novan frazon: kia pleonasmio! sufiĉas unu: aŭ punkto, aŭ majusklo. la punkto ŝajnas al mi pli konsekvenca kaj ankaŭ pli oportuna, ĉar ĝi havas nur unu formon; se ni elektas la majusklon, ni devas provizi 27 (aŭ eĉ 28) diversajn formojn por signi unu signifon!

Ĝis nun oni uzis majusklojn ankaŭ kiel komencliterojn de propraj nomoj, sed kian utilon havas tiu kutimo? ĉu ĝi estas pravigebla per motivoj de ĝentileco? sed ni skribas ankaŭ pri niaj plej grandaj malamikoj tiamaniere! la ĝentileco ne estas afero de majuskloj, kaj nia estimo al iu aŭ io ne fariĝas pli aŭ malpli sincera pro la maniero per kiu ni literumas ties titolon! u. e. a. restas same universala kaj admirinda sen la majuskloj, kaj s-ro mason stuttard ne estas malpli grava persono ol S-ro Mason Stuttard; se ni nepre deziras esti ĝentilaj, ankoraŭ restas al ni diversaj pli pozitivaj rimedoj. ni skribu, ekzemple, "kara tre aparte altestimata sinjora moŝto mason stuttard", aŭ simile.

foje ni uzas majusklojn por SUBSTREKI iun vorton aŭ frazon. tre klare ankaŭ tiun rimedon ni povas anstataŭi per *dikaj literoj* aŭ *kursivoj*. tiuj, kiuj ankoraŭ sentas bezonon de majusklo por signi respekton ĉe unuopaj nomoj, povas kontentigi sian konsciencon per la samaj rimedoj: *dio*, *zamenhof*. tiamaniere ili eĉ pli apartigas la honorindajn nomojn de la cetera kunteksto, kaj krome evitas konfuziĝon inter (ekzemple) "Zamenhof" kaj "Mason Stuttard".

aŭdiĝis eĉ voĉo en la dezerto, kiu postulas majuskladon de adjektivoj formitaj el propraj nomoj, k. ekz., Angla stultulo, Hungara geniulo, k. t. p. sed s-ro engholm jam tiel bone pritraktis tiun temon (mr 1/1949 p. 22—24), ke estas nenecese aldoni vorton ĉi tie. mi simple ne kredas, ke homo mense sana povus supozi, ke iu, kiu "enamiĝis al sardino", kisasas fiŝon.

tiu ĉi mia propono forigi la majusklojn ne estas esence revolucia. jam ekzistas alfabetoj (ekz-c, la araba), kiuj tute ne konas ilin. AL LA ALFABETO DE LA LATINA LINGVO MANKIS MINUSKLOJ. VI RIMARKAS, ĈU NE, KE TIO HAVAS LA SAMAN REZULTON: NENIA DISTINGO ĈE FRAZKOMENCIĜO, NENIA APARTIGO DE PROPRAJ NOMOJ, K. T. P. do jen mia devizo: unu mondo, unu skribmaniero! for la duobla formo de ĉiu litero! estas evidente, ke la majuskloj ne estas bezonataj, ĉar ni ja ne elparolas ilin. kaj pripensu! vi ŝparos al vi la energion kaj la tempon, kiuj necesas por premi ankoraŭ unu klavon sur via skribmaŝino! vi ŝparos inkon kaj

spacon! kaj la legantoj tre rapide kutimiĝos al la nova ordo. multaj eĉ ne rimarkos la aliigon.*

sed atentu: mi ankoraŭ ne *malpermesas* al la samideanoj uzadi la malnovan ortografion. ĉiu rajtas elekti laŭ la bontrovo de sia konscienco, mi estas tre larĝanima homo.

Komentoj

Miskompreno.

Laŭ iniciato de SAT diversaj esperantogazetoj, inter ili MR, antaŭ nelonge esprimis la deziron, ke verkantoj ne sendu samajn kontribuojn al pluraj gazetoj, ke oni petu permeson, kiam oni deziras represi artikolojn, ke tradukantoj havigu aperigpermeson por tradukoj, kiujn ili deziras aperigi.

La hispana "Boletín" komentas:

"Legante tion, simplaj membroj en nia movado vere miras — aŭ iomete fieras — ke jam nia gazetaro atingis la rangon de ordinara negoco, kies sanon ĝia mastro devas ja defendi per ĵaluzo konservado de sia propraĵo, rigore gardante, sole por la ĝuo de la limigita legantaro, artikolojn kies diskonigo estas utila, kaj eĉ konvena, por la tuta esperantistaro, kiam atentinda nombro da samideanoj ne povas pagi siajn abonojn por rekte ricevi eksterlandajn gazetojn, pro la malhelpoj kaj baroj, eĉ absoluta neebleco, sendi monon de lando al lando. Konstante tion, aliaj membroj — ne tiel simplaj — el nia movado, ne ŝatas akcepti la ideon, ke ekzistas pretendo, en la nuna tempo, starigi trustojn sub komerca marko de la verda stelo."

Tio estas granda miskompreno kaj erariga prezento al la legantoj de "Boletín".

En ĉiuj landoj — mi supozas ke en ĉiuj — troviĝas certaj

* precipe tiuj samideanoj, kiuj ne abonas al niaj gazetoj kaj ne legas nian literaturon.

ĵurnalistaj principoj de honesto kaj ĝentilo, kiujn oni sekvas sendepende de tio, ĉu ili estas leĝe esprimitaj aŭ ne.

Unu tia principo estas, ke verkanto ne vendas samtempe aŭ en mallonga tempo la saman verkon al pluraj gazetoj aŭ revuoj. Mi supozas, ke ĉiuj komprenas la sencan de tiu principo, kaj tial mi ne klarigas ĝin. (Ke aŭtoro laŭ interkonsento — ordinaro per iu perejo — samtempe aperigas artikolon en multaj gazetoj ne estas peko kontraŭ la principo.)

Alia principo estas, ke gazeto ne sen permeso represas artikolojn el aliaj gazetoj. (Pro iu aŭ alia motivo citi partojn de artikoloj ne signifas represon.)

Vi eble diras, ke la enhavo de esperantaj gazetoj estas afero, kiu koncernas nur nin esperantistojn, kaj ni povas havi niajn proprajn kutimojn kaj principojn?

Kontribuoj al esperantaj gazetoj ĝenerale estas senpagaj. La verkinto eble diras al si, ke li estas ankoraŭ pli bonfara, se li donacas la saman artikolon al multaj gazetoj. Se ni rekonus tian pensadon kiel principon, la enhavo de la plej legataj esperantogazetoj baldaŭ estus grandparte la sama. Kian sencan havus tiokaze pluraj gazetoj?

Tiu punkto estas grava ankaŭ praktike. Eksemplo: La kosto de unu paĝo en MR estas ĉ. 15 kronoj. Se en MR aperus tri-paĝa artikolo, kiun la legantoj samtempe legus en du, tri aliaj gazetoj, ili certe ne ŝatus tiun aranĝon. La redaktoro estus trompinta ilin pri la enhavo de tri paĝoj. Ili pagis sian abonon por ricevi apartan, novan legaĵon, ne por ricevi la saman, kiu troviĝas en aliaj gazetoj. La redaktoro siaflanke konstatas, ke li tute sencele pagis 45 kronojn por tiuj tri paĝoj.

Sed supozu, ke esperanta gazeto pagas por siaj artikoloj. Supozu, ke iu senpote represas artikolon, por kiu la gazeto pagis 6—7 dolarojn aŭ egalvaloron. Ĉu vi trovas tion korekta kaj ĝentila?

Cetero temas ne nur pri la redakcioj. Ankaŭ la aŭtoroj havas rajton pri siaj verkoj, ankaŭ al ili ni devas esti ne malĝentilaj. MR aperigis diversajn artikolojn de iuj tre eminentaj svedaj humanistoj kaj sciencistoj. Kion tiuj pensus kaj dirus pri la esperantistoj kaj la esperantomovado, se ili trovas, ke aliaj esperantaj gazetoj sen permeso represus iliajn artikolojn?

Nia rilato al tiaj homoj diversnaciaj estas atentinda afero. Mi estas konvinkita, ke esperantaj gazetoj kaj revuoj devos utiligi la kapablon de tiaj homoj, se ili volas fariĝi veraj gazetoj kaj revuoj. Inter la esperantistoj ne troviĝas tiom da sciencistoj, humanistoj kaj verkokapablaj homoj, ke ili povas provizi per kontentige multe da plene aprobinda materialo.

MR siaparte volonte donas permeson pri represio. Mi estas certa, ke ankaŭ aliaj redakcioj faras tion. La atentigo kritikita de "Boletín" ne estas klopodo por krei ian "truston". Ĝi nur akcentas, ke ni esperantistaj verkantoj kaj redaktoroj ne estu malpli honestaj kaj ĝentilaj ol niaj nacilingvaj kolegoj, ke ankaŭ ni respektu ĝenerale rekonitajn ĵurnalistajn principojn kaj ne agu nur laŭ propraj placo kaj avantaĝo.

S. Engholm.

Literaturo

Miguel de Cervantes Saavedra: La genia kavaliro Don-Kiĥoto de Manĉujo, parto I, ĉap. XXII. Tradukis Luis Hernández. Eldonis Hispana Esperanto-Federacio, Valencio, 1949.

Unu plia pruvo aldoniĝas al la vico de partaj tradukoj de la ĉefverko de Miguel de Cervantes Saavedra. De kvar hispanaj esperantistoj mi legis jam antaŭe presitajn fragmentojn. Mi legis ankaŭ, ke la mortinta Bulhuis postlasis manuskripton kun kompleta traduko. Multajn tentis jam la eminenta ĉefverko de la mondliteraturo. Probable — kaj dezirinde! — ĝi ankoraŭ tentos multajn aliajn. Eĉ la subskribanto troviĝas inter la tentatoj al tiu traduko...

S-ano Hernández estas bona stilisto, sendiskute unu el la nun plej kompetentaj lingvoartistoj sur la hispanlingva areo. Sed tiujn elstarajn ecojn mi povis ĉefe konstati ĉe liaj originalaĵoj. Li diras, ke li penis traduki "kun stilo klara, por ebligi facilan legadon eĉ al tiuj samideanoj, kiuj situas ekster la areo de la hispana lingvo". Kaj komence li lokas la moton de

Cervantes: "La granda Homero ne skribis latine, ĉar li estis greko; nek Virgilio skribis greke, ĉar li estis latino". Nu, ĉu tiuj peno kaj moto estas konsekvence obĉitaj en la traduko de Hernández? Sincere dirate, laŭ mia lingvosento, ne.

Du kritikindaĵoj ĉefe reliefigas. Unue elstaras, ke la traduko ne estas ĉiuloke komprenebla, eĉ por hispano. Tio dependas de la fakto, ke por traduki Cervantes necesas esti pli malpli fakulo pri la 16-jarcenta hispana beletra lingvo. La nuna lingvouzo diferencas pli, ol supraĵa rigardo supozigas, de tiu de la 16:a jarcento, ĉar ja la nuna hispana lingvospirito formiĝis nur en la 18:a jarcento. Kaj tiu diferencigo kaŭzas, ke Hernández multloke metis malglataĵojn pro ne klara kompreno de la originalo. Ĉar, kion signifas "akomodi la dorson per *centaĵo*"? (p. 6). Tie la hispana vorto *ciento* signifas *cent punbatoj*, tial, ke la tiutempa ĵargono de la trompisto kutimis nomi la aĵojn per ĝiaj adjektivoj. — "Prunti la langon" (p. 6) estas metaforo probable ne ĉie komprenebla; ja la hispana *servir de lengua* signifas *roli kiel interpretisto*. — "Kaj unue li promcnigis la ĝibon" (p. 6) eĉ kun helpo de la hispana teksto mi ne sukcesis plenkompreni, ĉar la hispanaj respondaj vortoj *pasear las acostumbradas*, frazo pruntita el la jurista lingvaĵo tiuepoka, signifas proksimume *fari la kutiman (pilorian) stratpromenon*, pro tio, ke la tiamaj juĝistoj, laŭ formulo, kondamnis je nombro da punbatoj kaj malhonora promcnigo tra laŭkutime konataj stratoj. — "Paradi en honto" (p. 6) metas Hernández por la hispana *salir a la vergüenza*; mi preferus *pilorie paradi*. — Kaj ĉi tiuj ne estas la solaj malglataĵoj, kiujn mi trovis sur la 6:a paĝo. — Cetere la novajn vortojn *alcañedo* (p. 6) kaj *vaseo* (p. 10) por la hispanaj *alcahuate* (= amorperisto, fisvatisito, peranto de amintrigoj) kaj *bacia* (= harbopelvo) mi trovas nek taŭgaj nek necesaj.*

* Por la hispana vorto *alcahuate* V. Inglada Ors uzis la neologismon *makrelo*, kaj por la verbo *alcahuatear*, *makreli*; G. Saville, en sia traduko de *Judoj sen mono* de Michaël Gold, uzis la neologismon *pimpo*. Unu el ili, se oni nepre preferas neologismon, estus preferinda. — Cetere, ne ekzistas komuna radiko por tiu nocio: angl. *pimp*, fr. *entremetteur*, germ. *Kuppler*, hisp. *alcahuate*, it. *ruffiano*, kat. *arcabot*, port. *alcatiteiro*, lat. *leno*, ktp.

La dua punkto temas pri la vortordo. Kiam mi siatempe legis la *Postkursa libro de esperanto* de Jago Veki (Eld. de J. Werkerle, Paris), min ŝokis ĝia ne kutima vortordo, ekz. p. 10:

Pri la vortoj, kiuj ne havas laŭregulan finaĵon — ni sciu, ke ilian rolon en la diversaj ĉapitroj ni mencias. Iliajn signifon eklerni estas tiel grave, kiel bezonate estas la signifon kaj rolon de la "simplaj vortoj". Nun ni nur tion konstata, ke ili sendependan formon havas, kaj al kvar grupoj apartenas.

Sajne ĝi dependas de latinlingva spirito, ĉu kutima, ĉu imita, ĉu afekta. Generale la hispana lingvospirito postulas verbon ĉe frazkomenco. Imiti jen la latinan, jen la hispanan, jen la germanan aŭ aliajn lingvospiritojn estus perforti kaj sennaturigi esperanton, kiu ja estas lingvo memstara kaj kun propraj ecoj. Tial la emo de Hernández — oble nekonscia — imite al la hispana komenci priskribajn frazojn per verboj (vidu en lia traduko la alincojn komencajn *rakontas, alvenas, venis, pasis, okazis*) estas evitinda, ĉar esperanta traduko estas ju pli lingvo bona, des pli esperante bona. La zamenhofa kaj ĝenerale la bona esperantista stilo uzas verbon meze kaj ĉirkaŭe de ĝiaj komplementoj, kiel ankaŭ okazis ĉe la malnovgreka. — Aliajn hispanismojn mi trovis, sed ilin detale menciis estus troo en ĉi tiu recenzo.

Ankaŭ pri la plena titolo de la verko mi havas alian opinion koncerne ĝian tradukon. Mi metus *La sprita hidalgo Don Kihoto el Manĉujo*. Mi ne uzus ligstrekon inter *Don* kaj *Kihoto*. La hispana vorto *ingenioso* estas en esperanto (*tert*)-*sprita; genia*, kiun uzas Hernández, el la esp. *genio*, kiu respondas al la hisp. *genio*, havas alian signifon, ne pravigeblan ĉi-kaze. Kaj mi kredas, ke la neologismon *hidalgo* postulas la fakto, ke nenio, ekster Portugalio kaj Hispanio, signifas parencaĵon al ĝi. Ĝi estas koncepto, kiu naskiĝis en Iberio, danke al la araba invado, kaj poste vestiĝis per latinida fonetismo. Estas ja kurioze, ke ne troviĝas io formale kaj enhance responda ĉe aliaj romanidaj popoloj. — Sed pri tiu neologismo kaj ĝia signifo mi skribos detale alian fojon.

Ĉu tiom longa recenzo por ne plenaj 10 paĝoj? Jes ja! Ĉar tiu entrepreno — la traduko de *Don Kihoto* — postulas plej

seriozan atenton; tiom, ke mi sugestas por ĝia plenumo kolektivian laboron, kiam oni faris por la majstra esperantigo de *Sep fratoj* de Kivi. Certe la kunigo de la nederlanda manuskripto — se havebla — al la serioza laboro de amiko Hernández, kun la eventuala profitigo de antaŭaj konsulteblaj laboroj, kaj la kunlaboro de aliaj spertaj hispan- kaj alingvaj samidanoj povos iam — espereble ne tre malproksime — okazigi la ege deziratan transigon al Esperantujo de la verko, kiu, post la Biblio, ĝuis plej da tradukoj en la mondliteraturo.

J. Régulo Pérez,
Kanariaj Insuloj

Red. rimarkigo: Se la hispana vorto *alcahuete* ne havas iun specialan senconuancon, verŝajne sufiĉas la jam uzata "parigisto", "kunligisto" aŭ alia pure esperanta vorto.

Stefan Zweig: BRULANTA SEKRETO kaj aliaj rakontoj.

Tradukis K. R. kaj E. P. Schwerin.

Nro 9 en la EPOKO-serio. Prezo 3 ŝ. 9 p. — afr. 3 p.

Eld. The Esperanto Publishing Co. Ltd.

Stefan Zweig estas tiom konata, ke nek li nek libro de li bezonas specialan prezenton. Tiu ĉi libro enhavas la novelojn *Brulanta sekreto*, *Epizodo de la Ĝeneva lago*, *La batalo pri la suda poluso*, *La reĝa ludo*. Krome troviĝas en ĝi la *Adiaŭa letero*, kiun li skribis antaŭ sia memmortigo.

Neniam antaŭe mi renkontis tiel plenvivan kaj stila tre alt-nivelan tradukon kun tiom da nebonaj kaj ŝanĝindaj esprimoj kaj ankaŭ craroj. Tiu negativa kvalito apartenas precipe al la komenco. Legante la libron mi faris notojn nur sur la unuaj 30 paĝoj, sed poste mi ĉiuokaze ne rimarkis tiom da mankoj, kaj iom post iom ili fariĝis tre maloftaj.

Se la lingvo de la manuskripto ne estas tre plibonigita, la tradukintoj devas esti tre talentaj stilistoj kun kvazaŭ natura kapablo esprimi sin en esperanto. Malofte oni en esperantaj literaturaj tradukoj renkontas tiel fluan kaj atentokaptan stilon. Per iomete da lingva memkontrolado la tradukintoj povos

forigi la manketojn de sia lingvouzo kaj fariĝi perfektaj, alt-rangaj stilistoj.

Preskaŭ ĉiuj eraroj estas tempaj, de jena speco: "si trovis, ke ŝi ne plu sentis sin tute certa ..." En la komenco tiu eraro konskvence revenas en tiaj frazkonstruoj. Poste ĝi maloftiĝas kaj fine ŝajnas malaperinta.

(La lokomotivo) "fortiregis rulbrue la nigran ĉenon ..." (la vagonaron. — La sufikso ŝajnas al mi tie stile nebona esprimo. Same "iom spiregante". La senco estas klara, sed la du vortoj estas tro kontraŭdiraj por formi bonstilan esprimon. Same "proksimege al la abismo".

Multloke estas uzata adverbulo (verŝajne korekte laŭ multaj lingvokonsilantoj), kie laŭ mia koncepto adjektivo estus ĝusta. "Li eksidis malgaje". La kunteksto indikas, ke temas ne pri la maniero sidi sed pri la persono. "Edgar kuŝis en la mallumo, feliĉe kaj embarasite ...".

Pri kelkaj esprimoj respondas eble la originalo kune kun ne-atento al la postuloj de esperanta esprimado. "Junulo simpatie notinda", "la sonoriletoj tintis longe antaŭen de ili", „malhelvaganĵaj okuloj", "timigitan impreson", "pensira koro".

Sed tio estas nur bonintencaj atentigoj, faritaj kun sincera deziro, ke tiuj tradukantoj daŭrigu sian laboron por la esperanta literaturo.

S. Engholm.

Kamemoro: Mary kaj Sulo.
Vilho Setälä: Taglibro de kongresano.
Eldono Vilho Setälä, Helsinko.

Tiuj du libretoj estas tre sukcesa provo krei studmaterialon por komencantoj. La unua estis verkata ankaŭ kiel propagandilo, varbilo. Ĝi enhavas kelkajn leterojn inter finna junulo kaj angla junulino, komencantoj en esperanto, en simpla sed bona esperanto, kun entute 550 vortoj. Ĝin akompanas "Vojmontrilo

al tutmonda korespondo" (nacilingva) en kiu la varbato povas lerni la fundamentojn de la esperanta gramatiko kaj la 550 vortojn, kiuj estas grupigitaj laŭsence. Taglibro de kongresano estas daŭriga libreto kun plivastigo de la vortprovizo. Ankaŭ ĝia vortlisto estas grupigita laŭsence.

Mi ne scias en kiom da lingvoj la Vojmontrilo estas tradukita aŭ kiom da sukceso la libretoj havis. Ŝajnas al mi nekredoble, ke homoj emas parkere lerni 550 vortojn kaj iom da gramatiko por povi poste legi kelkajn leterojn en esperanto. Alia nekonsento estas, ke la literoj en ambaŭ libretoj estas tre malgrandaj. La tipografio estas tre grava afero en komencaj lernolibroj, kaj kontentige grandaj literoj estas gravega detalo, kiu tre faciligas la lernadon.

Sed se la sukceso de la libretoj kiel varbiloj — t. e. rezultodonaj varbiloj — eventuale estas malpli granda, ol la eldoninto esperis, tio neniel malgrandigas la valoron de Mary kaj Sulo aŭ de Taglibro de kongresano. Ili prezentas al la komencantoj bonege elektitan fundamentan vortprovizon kaj simplan, modelan lingvouzon (iajn ŝanĝetojn oni povus proponi). Ili povas tre faciligi kaj agrabligi la unuan lernadon, kaj ili meritas ĝeneralan uzadon ĉie en la mondo.

S. E.

Daniel Quarello: Komplementoj de Verbo.
Prezo: 5 rpk.
Eld: Quarello & Cia, Buenos Aires.

La libro, 32 paĝa, konsistas el ekzemploj pri la uzo de verbaj komplementoj. Laŭ subtitola indiko ĝi estas "Libro-gvido por niaj verkistoj, tradukistoj kaj literaturamantoj". Jam la vorto "libro-gvido" vekas dubon pri la pravo de tiu pretendo kaj multaj ekzemploj en la libro konfirmas, ke ĝi havas tro da mankoj por meriti tian rangon. Jen kelkaj: "La abono finiĝos je julio." Ĉu je la komenco ĉu je la fino? "Mi finis legi la tutan libron en kvar tagoj." "Pasteur, la franca saĝulo ..."

La epiteto apenaŭ estas la ĝusta. "La tablo staras malrekte ..."
La senco estas: oblikve. "Jam du jarojn la instruisto mortis."
Iu subtitolo: "Staro aŭ movo cis ia loko". Se iuj poetoj sentas
bezoonon de la vorto cis, tio ĉiokaze ne signifas, ke ni bezonas
ĝin ordinare kaj en prozo. Kaj kial uzi "ia" anst. "iu"? "La
ĉasistoj provis la novan pulvoron pro pruvo." Ĉu estas necese
aŭ eĉ aprobinde klarigi certan uzon de "ludi" en jena maniero:
"La orkestro ludis valson. (= La orkestro pri-ludis valson)."
Aŭ: "Tiu libro respondas ĝeneralan bezoonon. (= Tiu libro pri-
respondas ĝeneralan bezoonon)." Laŭ ordinara lingvouzo la lasta
frazo signifas, ke la libro estas responda pri la bezono, do estas
ĝia kaŭzo.

Sed kompreneble eraroj kaj nebonaĵoj estas esceptoj. Cetere
la libro taŭgas por lernado. Alia, principa rimarkigo: ŝajnas al
mi ne bone kolekti en libroj por lernado malnovajn kaj nelern-
tajn frazmodelojn, kiam ekzistas pli simplaj kaj bonaj. Al la
lernantoj oni donu la plej simplan kaj plej bonan lingvon de la
nuntempo. Malnoviĝintaj esprimoj neuzindaj, neuzindaj alme-
naŭ en ordinara lingvo, havas sian lokon en kompleta grama-
tiko kaj kompleta vortaro.

S. E.

S. Tokunaga: Malsato en riĉa rikolto.
Tradukis kaj ilustris K. Nakagaki.
Eld: Toga-ŝobo, Tokio.
Prezo: 0,20 US. dol.
Mendebila ĉe Japana Esperanto-Instituto.

Tiu ĉi 32paĝa novelo temas pri mizero de farmistoj kaj mal-
altklasuloj en Japanujo. Certe ĝi estas verkita kiel atesto kaj
instigilo ĝuste por tiuj homoj. Al homo fremda en tiu medio
la rakonto eble ŝajnas fragmenteca kaj la figuroj iomete om-
brosimilaj. La lingvo de la traduko estas korekta sed kelkloke
iom nelerta.

S. E.

N. Fernandez Menendez: Valor educativo del esperanto.
La sama: El esperanto en la opinión de hombres
eminentes.

Eld: "La bona semisto", Montevideo.

La unua el tiuj kajeroj estas bonege verkita informilo pri
esperanto kaj varbilo por ĝi. Ĉio estas koncize dirita, sen su-
perfluaĵoj, sed nenio mankas. Kiel la titolo indikas, ĝi tre
atentas la edukan valoron de esperanto, rilate kaj al individuoj
kaj al popoloj. Ĝi ŝajnas al mi bone uzebla ankaŭ en aliaj
hispanlingvaj landoj. — La dua kajereto estas riĉa kolekto de
eminentulaj opiniesprimoj pri esperanto. El la antaŭparolo:
"Milionoj da personoj en ĉiuj landoj de la mondo parolas ĝin"
(esperanton). Mensogoj makulas kaj nin kaj esperanton.

ATENTIGO. Pro neatento mi skribis en rec. pri Marista ter-
minaro en nro 1/50, ke nur membroj de UEA povas akiri tiujn
terminarojn. Sed post certa tempo oni represas tiujn terminar-
ojn, kaj ili estas libere aĉeteblaj.

S. E.

Al la legantoj

La pli granda amplekso de tiu ĉi numero dependas ne de pli
bona ekonomia stato de la revuo. Pro la temoj kaj aliaj kvalitoj
de la pli longaj artikoloj estis neeble aranĝi bonkomponitan
numeron kun 32 paĝoj. Ankaŭ kun la nuna amplekso ĝi ne estas
bona, tamen espereble iom pli kontentiga.

Pro malfruiĝo en la kompostejo, ĝi aperas almenaŭ unu
monaton pli malfrue ol ĝi devus. La legantoj afable pardonu.

Kvankam kredeble tio ŝajnos al vi teda ripetado el iamaj
numeroj, mi devas aldoni kelkajn vortojn pri la stato de la
revuo. La lasta numero de 1949 eliris al ĉ. 550 abonantoj, kaj
mi trovis tiun nombron esperiga. Hodiaŭ, la 23an de aprilo
1950, la tuta nombro de abonantoj estas 350.

Tiu fakto dependas ne de la anoncita dumonata apero kaj la tom pli alta jarabono. Ĝi povas dependi nur de manko de intereso por la enhavo de la revuo aŭ — kio esence estas la sama — inerto. Kaj estus ja efektive tute sensece, se tiuj abonus la revuon, kiuj ne trovas en ĝi ion legindan. Al ĉiu laŭ lia gusto. Sed ĉu ne troviĝas en la tuta esperantistaro almenaŭ mil personoj, kiuj trovas leginda tian revuon, kia estas MR? Verŝajne jes.

Tiukaze restas la demando, kiel ili fariĝu abonantoj. Anoncado ne helpas, kiam temas pri revuo de la speco al kiu apartenas MR, nek gazetanoncoj nek cirkuleroj. Mi havas pli ol sufiĉe de sperto pri tio. La perado de libroservoj havas certajn avantaĝojn sed estas aliflanke malavantaĝa. Bone atentu, ke mi ne kritikis libroservojn. Ilia tasko estas peradi librojn kaj gazetojn laŭ mendoj. Ili nek povas nek devas propagandi kaj speciale favori iun certan gazeton aŭ libron. Sed el tio sekvas, ke laboro por disvastigi la revuon tiukaze ne estas farata.

Kiam temas pri disvastigo de tia revuo, kia estas MR, nur rekta, persona kontakto kaj persona varbado donas rezulton. Sepjara sperto konfirmas tion al mi. Kaj tial mi denove turnas min al vi, la ne tre multaj sed fidelaj amikoj de MR. Se vi deziras, ke ĝi restu viva kaj ke ĝi, se eble, eĉ prosperu, mi invitas vin al helpo. Se vi povos havigi dek abonantojn faru tion, se kvin, faru tion, kaj se nur unu, faru tion. Ne haltigu vin pensoj pri malfacilo de mosenado. Iel oĝi povas ĉiam aranĝi tiun aferon.

Korajn salutojn!
Stellan Engholm.